

Bulgara **ESPERANTISTO**



* * *	La nova kontraŭfaŝisma ribelo en la mondo — La	
	Septembra Ribelo de 1923	1
* * *	Telegramo al Leonid Iliĉ Breĵnev	3
	Ĥristo Gorov. Septembra heroo	3
* * *	Rezultoj de la Jubilea Literatura Konkurso	4
	Emil Ĉirpanski. Oratora konkurso dediĉe al la Septembra Ribelo	5
	Stefan Minkov. El „Rememoroj“ (daŭrigo)	6
	Stefan Darĵonov. Frataj renkontigoj	7
	Georgi Dimov. Bona somera propagando de Esperanto	7
	Kunĉo Vălev. La 58-a Universala Kongreso de Esperanto	8
* * *	Rezolucio de la 58-a UK de Esperanto	9
* * *	Post Beogrado — al nova pli fruktoŝona agado (La	
	Sesa Ĝenerala Konferenco de MEM)	10
	K. Vălev. La ĉi-jaraj konferencoj de esperantistoj-pedagogoj	
	en Maribor	11
	Egorov Paŭlo. La radioj de la verda stelo	13
	Boris Kolker. La plej bona klubo	13
* * *	Pli ol 300 artikoloj en „Der Morgen“	13
	Franca Taddei. Granda sukceso de Esperanto en nia lernejo	14
* * *	Ĝojiga novaĵo el Sovetunio	14
	Jakov Vlasov. Netaksebla donaco de niaj vietnamaj amikoj	14
	Geo Milve. El la poemo „Septembro“	15
	Prodan Prodanov. Blanka nokto	18
	Simeon Ĉirpanliev. Vivaj enterigitoj	20
* * *	Partizanino (popola kanto)	24
	Dimĉo Debeljanov. Ĥela kredo	24
	Nikolaj Zidarov. Impulso	24
	Ilija Ivanov. Veto pri la honoro kaj farto de la bulgaro	25
	Stefan Sokolov. La fago	26
	A. S. Puŝkin. Exegi monumentum	27
	Orlin Orlinov. Ĉe Lenin estis mi	27
	Robert Roĵdestvenskij. El „Poemo pri diversaj vidpunktoj“	28
	Mihail Ŝekerĝiev. Aŭtuno estas	28
	Prodan Prodanov. Nokturno	29
	Danĉo Danĉev. Mia patrujo	30
	Damjan Damjanov. Fabelo	30
	Stojan Kostadinov. Alloga lumo	30
	Ljudmila Jevsejeva. Grava demando. Diligentaj manoj. Se-	
	majno. Flageto	31
	Marin Băcev. Krucvortenigmo	32
	Jozef Chvosta. Akurata gardisto. La kranioj	32
	Georgi Simeonov. Forpasis Vladimir L. Ĥristov	IV
* * *	El letero el Venezuelo al P. Atanasov	IV
* * *	Nekrologoj	IV

Sur la kovrilpaĝo:

„LA STANDARDO NE FALIS“

de Nik. Mirĉev

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
Bucuresti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva
V—449.

SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.



LA UNUA KONTRAŬFAŝISMA RIBELO EN LA MONDO — LA SEPTEMBRA RIBELO DE 1923

Forpasis 50 jaroj depost la heroa Septembra Ribelo — grandioza epopeo de la bulgara laborpopolo. Kiom ajn multiĝos la jardekoj en la senindulga kurado de la tempo, la gloro de tiuj, kiuj la unuaj en la mondo provis haltigi la ofensivon de la faŝismo, ne forvelkos, kaj la generacioj inspiriĝos de ilia heroaĵo.

Post la Unua Mondmilito sub influo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio la tutan mondon superverŝis ondego de socialismaj, demokratiaj, kontraŭimperiismaj revolucioj. La Septembra Ribelo estis unu el la elstaraj kaj lastaj elmontriĝoj de tiu ĉi postmilita revolucia ondo.

Bulgario eliris el la milito venkita. Centmiloj da mortigitoj kaj vunditoj, ruinigita nacia ekonomiko, mizero kaj suferoj por la larĝaj popolamasoj — tio estis la rezultoj de la milito. Ĉefaj kulpantoj pri tiu nova nacia katastrofo estis la monarko kaj la grand-burĝaro. Tial la monarkia instituto apenaŭ sukcesis reteni siajn ŝanceliĝintajn fundamentojn. Dentgrincante la grandburĝaro estis devigita cedi la ŝtatan potencon al la Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo (bulgare: BZNS). La demokratia enlanda kaj eksterlanda politiko de l'Agrarana Unuiĝo, ĝiaj ekonomiaj reformoj tuŝis la interesojn de la cara kortego kaj de la ĉirkaŭ ĝi grupiĝinta burĝaro kaj provokis ilian malkontenton. Sed la reakcia burĝaro sentis morttimon antaŭ ĉio de la Bulgara Komunista Partio, kiu post la milito transformiĝis en gravegan politikan forton. Tamen dum la Agrarana Unuiĝo estis reganta partio, la burĝaro estis kun ligitaj manoj — ĝi ne povis frakasi la komunistan movadon. Tiu ĉi cirkonstanco kondiĉis la orientiĝon de la reakciaj fortoj al puĉo. Ili vidis sian savon nur en la starigo de faŝista diktaturo.

Gravaj ŝanĝoj en la enlanda situacio ekestis en la printempo de 1923. Post la okazintaj en aprilo parlamentaj balotoj, kiuj prezentis plenan malvenkon por la burĝaj partioj kaj plian konfirmon de la kreskanta populareco de la Agrarana Unuiĝo, la gvidantaro de tiu lasta ricevis kapturniĝon pro sia laŭvica balota sukceso kaj faris eraran kaj fatalan konkludon, ke la reakciaj burĝaj partioj estas definitive venkitaj kaj ke ili tute ne minacas la memstaran regadon de la Agrarana Unuiĝo. La gvidantoj-agraranoj komencis vidi en la Bulgara Komunista Partio eventualan rivalon rilate al la ŝtata potenco. Por malpliigi ĝian influon ili entreprenis reprezaliojn kontraŭ la komunistoj, kio rezultigis malboniĝon de la rilatoj inter la Bulgara Komunista Partio kaj la Agrarana Unuiĝo.

La sperta kaj scipovanta "manovri finance grandburgaro" kaj la reĝa kortego utiligis nome tiun ĉi streĉon en la rilatoj inter la du grandaj partioj de la laborpopolo. Je la 9-a de junio 1923 la delonge projektata kaj preparata puĉo estis realigita. La laŭleĝa agraranpartia registaro de la lando estis renversita, kaj sur ĝia loko starigita sanga faŝista diktaturo. La ministro prezidanto Aleksandro Stambolijski estis senkapigita.

En tiu ĉi jatala momento la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio faris politikan eraron: ĝi okupis pozicion de neŭtraleco kaj restis observanto de la „batalo por la ŝtata potenco inter du burĝaj partioj“.

La Komunista Partio bezonis helpon kaj tempon por venki sian eraran taktikon. Tiam helpon ĝi ricevis de la Komunista Internacio kaj de la Komunista Partio de Sovetunio. Kaj ĝi decide orientiĝis al batalo por renverso de la faŝista diktaturo, por laborista-kamparana regpotenco. Malkovrante la kontraŭpopolan esencon de la faŝismo, Georgi Dimitrov argumentis la absolutan neceson pri kunagado de ĉiuj progresemaj fortoj, pri unueca fronto de ĉiuj tavoloj de la laboruloj el urboj kaj vilaĝoj.

La faŝista registaro de Aleksandro Cankov rapidis frakasi nun la Komunistan Partion kaj entreprenis amasajn arestojn de komunistoj. Tio akcelis la eksplodon de la ribelo. Ĝi ampleksis multajn regionojn de la lando. Leviĝis la laboristoj kaj la kamparanoj el la regionoj de Stara Zagora kaj Nova Zagora, de Kazanlâk kaj Pazarĝik, de Ĉirpan, Ihtiman, Razlog ktp. Plej granddimensia, plej amasa, plej bone organizita tamen ĝi estis en Nord-okcidenta Bulgario kun centro Ferdinand (nun Miĥajlovgrad). En la urboj Orjaĥovo, Bjala Slatina, Lom, Kneja kaj en la pli granda parto de la vilaĝoj estis proklamita nova, revolucia ŝtatpotenco. Ribelis ankaŭ la vilaĝanoj en la regiono de Vidin.

Ĉie la ribeluloj batalis brave, ignorante la morton. Sed por la venko ne estis sufiĉa nur abnegacia, heroa batalo. La ribelo suferis malvenkon. La kaŭzoj de tio ĉi estis multaj. Unu el la fundamentaj kaŭzoj tamen estis la nesufiĉa leninisma matureco de ĝia gvidanto — la Bulgara Komunista Partio. Ĝi havis nek sperton, nek hardiĝon en antaŭaj ribeloj kaj revolucioj. Tio estiĝis kaŭzo de tuta vico da eraroj. La faŝistoj sukcesis aresti la membrojn de la milita-revolucia komitato en Sofio, kaj la ĉefurbo restis ekster la ribelo. La komenca momento de la armita batalo ne estis samtempa, kaj tio faciligis la manovrojn de la monarko-faŝista registaro — ĝi povis doni ĝustatempan helpon ĉie, kie ĝi estis necesa. En la preparo de la ribelo oni subtaksis la tre gravan postulon altiri la soldatojn el la armeo al la flanko de la ribelo. La plejmulto de la oficiroj estis reĝaj edukitoj kaj defendis la kronon. En la procedo mem de la ribelo oni ne aplikis rapidan, surprizan ofensivtaktikon de la bataltaĉmentoj, kiuj en multaj okazoj aplikis taktikon de atendado, de sindefendo. Kaj sindefendo, instruas Lenin, estas morto por ĉiu ribelo. Unu fojon komenciĝinte, la ribelo devas decide antaŭenmarŝi.

Malgraŭ la allasitaj eraroj la Septembra Ribelo havas grandegan, historian signifon. La septembraĵ tagoj estis praktika lernejo por la Bulgara Komunista Partio, por la amplekso de ĝia mobiliza laboro inter la laboruloj. La Partio elkreskis kiel revolucia forto, kapabla gvidi estonte la popolamasojn al decida batalo kontraŭ la subpremantoj kaj ekspluatantoj.

La Septembra Ribelo estis granda revolucia lernejo ankaŭ por laboristoj, vilaĝanoj kaj popola inteligentularo. Ili konvinkiĝis, ke ilia savo estas en ilia kuniĝo en fortikan, solidaran unuiĝon, gvidatan de la

(Sekvas sur paĝo 5)



Estimata kamarado Brejnev,

La bulgaraj esperantistoj eksciis kun ĝojo pri Via honorigo per la plej alta distingo en nia lando — la honortitolo „Heroo de Popola Respubliko Bulgario“.

Kiel parto de la bulgara popolo ni ne povas ne esprimi la profundajn sentojn de ĝojo kaj fiero lige kun la aljuĝo de tiu ĉi alta titolo por Vi — la ĝenerala sekretario de CK de KPSU, la homo, kiu kontribuis ekskluzive multe por la senĉesa plifirmigo kaj evoluigo de la amikeco inter la granda sovetia popolo kaj la popolo de Bulgario. Por ni, la bulgaroj, tiu ĉi amikeco havas decilan signifon kiel por nia ekzistado de libera popolo, tiel ankaŭ por garantiado de korekta disvolvigo de PR Bulgario laŭ la vojo al matura socialisma socio kaj revata komunismo.

Ni deziras al Vi firman sanon por daŭrigi samtiel senlace kaj fruktodone Vian agadon por la bono de Sovetunio, de la socialisma komuneco, de la tuta pacama kaj progresema homaro!

Prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio

NIKOLA ALEKSIEV



SEPTEMBRA HEROO

Dum antaŭmilitaj jaroj en Plovdiv laboris por nia afero senlace kaj entuziasme la fervojisto-esperantisto Jeljazko Jordanov.

Naskita en la unua jaro de nia jarcento en unu el la iamaj kvartaloj de la nuna urbo Dimitrovgrad, li komencis perlabori sian panon estante apenaŭ 15-jara. En la tiama fervojstacio Rakovski li sindungis kiel novicon. En la laborista medio, kiun li eniris, influis lin la pli aĝaj kolegoj, adeptoj de la socialismo. En 1919 j. li partoprenis la tutlandan strikon de la fervojistoj. La lokaj strik- gvidantoj komisiis al li kontaktadi kun la distrikta strikkomitato en Plovdiv. Jeljazko sukcese plenumis tiun taskon.

Post la striko li ekloĝis en Plovdiv. Kiel vagongardisto li veturadis de Plovdiv ĝis Saranevo (nun Septembro). La ribelo en 1923 trafis lin en ĉi lasta fervojstacio. Jeljazko aliĝis al la ribelantoj kaj helpis ilin okupi la stacidomon kaj la lokomotivriparejon. Sed bone armitaj faŝistaj trupoj venkis

la taĉmenton de ribelintaj laboristoj kaj kamparanoj. Inter la persekutitoj estis ankaŭ Jeljazko. La staciestro tuj eksigis lin.

Dum kelkaj jaroj Jeljazko laboris en diversaj lokoj sub sekreta nomo. Post la amnestio li revenis en Plovdiv kaj serĉis laboron en la tiea fervojstacio.

En 1929, kiam en Plovdiv fondiĝis Laborista Esperanto-Societo, kaj oni malfermis Esperanto-kurson en la Domo de Metiistoj, Jeljazko aliĝis al la kurso kaj fervore studis la Internacian Lingvon. Post nelonge li fariĝis bona esperantisto kaj ekkorespondis kun kolegoj el diversaj landoj, precipe el Sovetinio, Germanio kaj Francio.

En aŭgusto 1932 li veturis al Berlino por partopreni la Fondkongreson de Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). Ĉe la Orienta Fervojstacio lin bonvenigis berlinaj esperantistoj kaj loĝigis lin ĉe proleta familio.

La Fondkongreso de IPE okazis en simpla dancsalono en Rosen-Thaler strato. Jeljazko salutis je la nomo de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio kaj raportis pri ĝia organiza stato, pri la agado de ĝiaj E-grupoj kaj societoj en 20 lokoj kun 350 membroj.

Kune kun diverslandaj kamaradoj, inter kiuj ankaŭ sovetianoj, li ekskursis al la ĉirkaŭaĵo de Berlino, vizitis mu-



zeon kaj la sidejon de Centra Komitato de Germana Komunista Partio. Dum iu ekskurso en Grünwald junaj faŝistoj komencis ofendi la kongresanojn, minaci ilin. Tamen la germanaj kamaradoj silentigis la provokantojn.

En la sama somero Ĵeljzko vizitis la kongreson de SAT en Stuttgart kaj pledis por kunlaboro inter ĉiuj esperantistoj-laboristoj. Malgraŭ la minaco

de la germana faŝismo lia pledo restis sen atento.

Ĵeljzko revenis el Germanio kun neforgeseblaj impresoj. Multaj el ni, kiuj aŭskultis pri liaj travivaĵoj, noble enviis lin.

La vizito al la kongreso de IPE instigis Ĵeljzko al senlaca agado por la bulgara LEA. Li disvastigis inter fervojistoj-esperantistoj la periodaĵojn „Balkana Laboristo“, „Mejdunaroden Ezik“, la centran organon de IPE, „Internaciisto“, la revuon „Nova Epoko“ kaj gazeton „Sur posteno“.

Pro sia politika agado je la fino de 1937 li estis forigita de sia oficejo.

Kiam eksplodis la Dua Mondmilito, Ĵeljzko kuraĝe batalis kontraŭ la bulgara faŝismo, kiu fariĝis aliancano de Hitler. Lia hejmo fariĝis rifuĝejo por persekutitaj antifaŝistoj. Ĉe li restadis la gvidantoj de Bulgara Komunista Partio Vasil Markov, Georgi Ĵeĉev, Rajĉo Kirkov k. a. Li sin dungis kiel vojaĝantan komerciston por povi transdoni al la komitatoj de BKP en Plovdiv-distrikto la partiajn instrukciojn.

Nelonge post la venko de la bulgara popolo en septembro 1944 lia koro ne eltenis. Li ne povis ĝui la liberecon.

Hristo Gorov

REZULTOJ DE LA JUBILEA LITERATURA KONKURSO

En n-ro 3 de nia revuo la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncis Literaturan Konkurson dediĉe al la 50-a jubileo de la Glora Septembra Ribelo (1923 j.) de nia popolo.

La konkurson partoprenis 15 geesperantistoj el 3 landoj (Bulgario — 12, Ĉeĥoslovakio — 1, Sovetunio — 2). Inter ili estis 12 viroj kaj 3 virinoj.

Prezentitaj konkursaĵoj 46 (37 — poezio, 9 — prozo). En la poezio: 20 originalaj verkoj kaj 17 tradukitaj. En la prozo: 7 originalaj kaj 2 tradukitaj. Post atenta prijuĝo la speciala ĵurio proponis kaj la Estraro de CK de BEA aprobis la jenajn premiojn:

I. POEZIO

a) Originala

I-a premio: ne aljuĝita.

II-a premio: al la versaĵo „Mia patrujo“ de Danĉo Danĉev el Plovdiv.

III-a premio: al la poemo „Viriĝo“ de

Stefan Kiraĝiev el Sofio.

b) Tradukita

I-a premio: ne aljuĝita.

II-a premio: al Stefan Kiraĝiev el Sofio por la traduko de la versaĵo „Ĉe Lenin estis mi“ de Orlin Orlinov.

II-a premio: al Klara Rabinoviĉ el Ĥarkov, USSR, por la traduko de fragmento el „Poemo pri diversaj vidpunktoj“ de R. Roĵdestvenskij.

III-a premio: al Zefira Dimitrova el Varna — por ŝia traduko de la popola kanto „Partizan'no“.

Kuraĝiga premio: al Rosica Georgieva el Pazarĝik — por ŝia traduko de la poemo „Ribelo“ de Dimitr Apostolov.

II. PROZO

a) Originala

I-a premio: ne aljuĝita.



(El paĝo 2)

Komunista Partio. Per la kune verŝita sango laboristoj kaj kamparanoj, komunistoj kaj agraranoj metis la granitajn fundamentojn de sia batala unuiĝo. Oni prave diras, ke sen Septembro 1923 ne eblus Septembro 1944 (kiam Bulgario liberiĝis el la faŝismo kaj kapitalismo).

Sed la Septembra Ribelo donis multajn pozitivajn lecionojn ankaŭ al la internacia komunista movado.

Nun la ideoj kaj la revoj, por kiuj leviĝis al batalo kaj mortis septembruloj, efektiviĝas. Ili trovas realan esprimon en nia libera socialisma patrolando, en la gigantaj konstruaĵoj de la jarkvinaj planoj, en la florantaj urboj kaj vilaĝoj, en la senĉese kreskanta materiala kaj kultura nivelo de nia popolo.

II-a premio: la rakonto „Blanka nokto“ de Prodan Prodanov el Sofio.

II-a premio: la rakonto „Gvardiulo“ de Ilija Kolev el v. Novi Han, distrikto de Sofio.

III-a premio: la rakonto „Rememoro 1923“ de Simeon Ĉirpanliev el Sofio.

b) Tradukita

I-a premio: ne aljuĝita.

II-a premio: al Stefan Popov el Ruse —

por lia traduko de fragmento el la romano „Vilaĝo Borovo“ de Krum Velkov.

III-a premio: ne aljuĝita.

La premiitoj ricevas diversajn monsumojn.

La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la premiitojn kaj dankas al ĉiuj partoprenintoj en la konkurso, dezirante al ili novajn kreaĵojn sukcesojn. Ĝi atendas de ili daŭran kunlaboradon al nia asocia organo.

ORATORA KONKURSO DEDIĈE AL LA SEPTEMBRA RIBELO

La Esperantista Societo „Fajrero“ en Dospat ĉiujare organizas oratoran konkurson. Ĉi-jare la konkurso estis dediĉita al la jubileo de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo de 1923 j. La temoj estis anoncitaj kaj skribitaj sur speciala propagandfolio. Preskaŭ du monatojn ĝi invitis al partopreno en la konkurso. La temoj estis:

1. Preparo de la Septembra Ribelo.
2. Eksplozo kaj disvolviĝo de la ribelo.
3. Georgi Dimitrov kaj la unua kontraŭfaŝisma ribelo en la mondo.
4. Historia signifo de la ribelo.
5. La Septembra Ribelo en la bulgara literaturo.

La tago de la konkurso venis. Proksimume 50 esperantistoj ĉeestis. La oratorado komenciĝis per Vladimir Mollov. Li elektis la temon pri la „Septembra ribelo en la bulgara literaturo“ kaj prezentis sin kiel vera oratoro. Kun impona patoso Mollov citis la vortojn de la verkisto Anton Straŝimirov pri la faŝistoj: „Ili buĉis la popolon tiel, kiel turkoj ne buĉis ĝin“. La juna oratoro vere pentris la vizaĝon de la faŝismo en Bulgario.

La patriota sento kaj la dankemo, ke ni vivas en libera socialisma lando, estis esprimita de ĉiuj partoprenantoj en la konkurso.

Ivo Ĉauŝev parolis pri sia fiero esti bulgaro. Li deklaris, ke li estas feliĉa rakonti pere de Esperanto al multaj homoj en la mondo pri nia lando kaj pri la glora historio de nia heroo, liberama popolo.

Oleg Dolapĉiev esprimis siajn sentojn kontraŭ la faŝismo ankaŭ recitante la versajon „Balado pri la komunisto“ de Veselin Andreev.


Veselin Penĝekov parolis pri la eksplozo de la Septembra Ribelo kaj ĝia disvolviĝo.

Partoprenis ankaŭ Nedjalka Petrova, David Mandev, Anastasija Parakozova kaj aliaj.

La plej bonaj estis premiitaj.

Emil Ĉirpanski

La junaj esperantistoj el Dospat kun sia instruisto Ĉirpanski



Post la forveturo de geedzoj Zamenhof s-ro M. Duchochois aranĝis la demandon pri mia franca civitaneco, kaj mi fariĝis dua mekanikisto sur la vaporŝipeto „Saint Jean“ malgraŭ la protestoj de la francaj kandidatoj, kiuj volis okupi la saman postenon. Per tiu ŝipeto ni vagadis eĉ al Islando, kie ni kaptadis moruon. Dumvoje, trapasinte la Manĉon, ni vizitis Britujon kaj Irlandon, kie mi havis la okazon renkontiĝi kun samideanoj en la urbo Bristol, Dublin kaj Belfast. Inter Britujo kaj Irlando nia vaporŝipeto estis kaptita de terura oceana ŝtormo kaj grandega ondiĝo, kiajn mi neniam spertis dum mia plurjara marnavigado. La ondoj leviĝis alten ĝis 16—20 metroj kaj nia vaporŝipeto balancis kiel peco da arboŝelo dum tri-kvar tagnoktoj. Kiam ĝi faladis en la fundon inter la ondoj, ni ne povis vidi la ĉielon supre, ŝed nur la akvon! Nia ŝipeto estis tiom malgranda kompare al la grandegaj transoceanaj ŝipoj — apenaŭ 90 tunojn! Ĉi-momente nia ŝipanaro el nur 15 maristoj timis pereon. Feliĉe tio ne okazis, kaj ni denove ekveturis al Islando.

Alveninte tien, mi vizitis la ĉefurbon Reykjavik. Tie ni renkontiĝis kun la dana s-ano Thomson, kiu laboris kiel oficisto en iu ŝipsocieto. Li akceptis min kiel frato, kiam mi ekparolis en Esperanto, kiun lingvon li tre flue scipovis. Sur tiu insulo li neniam ĝis mia alveno havis la okazon renkontiĝi kun iu ajn fremda esperantisto. Ni ambaŭ promenadis tra la bela ĉefurbo, parolante nur en Esperanto. Sur insulo Islando mi estis en la somera sezono, kiam la tago daŭras ses monatojn, t. a. kiam la suno subiras noktomeze kaj post duon-horo denove leviĝas je distanco de duonmetro de la subirloko.

Mia islanda samideano vizitis nian vaporŝipon kaj konatiĝis kun nia ŝipestro kaj kun la unua mekanikisto, farante per tio grandan propagandon pri Esperanto.

En Islando mi vidis kaptadon de grandaj balenoj, longaj 6—7 metrojn, ĉasitaj per kanonpafado de multaj kanonŝipoj.

Ĉe nia reveno de Islando ni devojiĝis en la francan milithavenon Dunkerque, kie mi renkontiĝis kun mia ekskorespondanto. Ni ambaŭ trarigardis ĵus konstruitan francan submarboaton.

Post unujara ŝipkrozado tra Atlantiko mi decidis forveturi al Parizo por specialiĝi je la tekniko. Tiucele mi luj ekkorespondis kun la franca s-ano G. Grosset, ĉefkontisto de usona fabriko por produktado de gasmotoroj. En sia respondo li komunikis al mi, ke li pretas aranĝi kun sia fabrikestro mian dungan en la fabriko. Post kelkaj tagoj mi forveturis Parizon kaj de tie al la antaŭurbo ivry sur Selne, kie mi estis akceptita persone de la

fabrikestro s-ro Tibodeau — francdevena usonano.

Mi sukcese faris akceptekzamenon en la fabriko kaj oni oficigis min kiel helpanton de la ĉefmuntisto.

En la fako de la fabriko, kie mi laboris, estis ankaŭ unu usona esperantisto, inĝeniero Schmid, kun kiu mi konstante interparolis en Esperanto. La francaj laboristoj ekinteresiĝis pri nia lingvo kaj multaj el ili komencis lerni ĝin.

En Parizo dum mia tuta libertempo mi vizitis ĉiujn esperantistajn kunvenojn, konferencojn, sciencajn prelegojn en la Sorbono k. a. Dum la festoj kaj ripoztagoj mi vizitis esperantistojn en ĉiuj parizaj regionoj. Interalie mi ĉeestis la teknikajn sciencleciojn de Carlo Bourlet en la Centra Lernejo de Artoj kaj Metioj, kie pro lia obstina insistado mi studis pri maŝinilaro kaj metaltranĉaj maŝinoj dum 6—7 semestroj. Carlo Bourlet estis tre arda kaj entuziasma propagandanto de Esperanto ne nur en Parizo, sed en la tuta Francio.

En la pariza antaŭurbo Vitry sur Seine mia konata gvidanto de E-kurso por instruistoj devis forlasi la urbon pro translokiĝo, kaj mankis konvena persono, kiu anstataŭu lin kiel kursgvidanton. Pro tio li turnis sin al mi, kaj mi konsentis daŭrigi la instruadon. La kurso finiĝis sukcese.

En 1911 j. mi vizitis la VII-an UK de Esperanto en Anvers (Belgujo). La saman jaron mi revenis Sofion, kie oni oficigis min kiel instruiston en la Mekanikoteknika Lernejo. Ĉi tie mi gvidis multajn E-kursojn por lernantoj. En 1922 j. laŭ ordono de la ministro de l'Popola Klerigo en nia lando Stojan Omarĉevski oni enkondukis instruadon de Esperanto en kelkajn dekojn da realaj gimnazioj. Mi mem estis oficigita kiel lektoro de Esperanto en la knaba gimnazio „Gladston“ en Sofio. Miaj E-kursoj estis amase vizitataj de la lernantoj. Dum la sekvantaj jaroj mi aranĝis ekskursojn por la kursanoj al la E-kongreso en Bukureŝto kaj ni vizitis ankaŭ Timiŝoara kaj Kluĵ (Rumanio), kie ni estis kore akceptitaj de la rumana samideanoj. Tiam mi havis la okazon persone konatiĝi kun la famaj rumana esperantistoj Robin, Fiŝer, Morario, Andreo Ĉe k. a.

En 1932 j. mi vizitis Budapeŝton kun miaj lernantoj kaj dank' al miaj konataj samideanoj en ĉi tiu urbo kiel Engelman, Gondor, Crifel, Balkany k. a. ni estis kore akceptitaj dum nia dektaga restado. En 1937 kune kun mia edzino mi vizitis la Parizan Internacian Foiŝon. Dum nia unumonata restado en Francio mi havis la feliĉon denove renkontiĝi kun pluraj el miaj ekskorespondantoj-esperantistoj preskaŭ el la tuta lando, samkiel kun aliaj francaj



samideanoj.

En Parizo mi volis viziti la famajn aŭtomobilfabrikojn „Citroen“, „Renault“ k. a., sed bedaŭrinde kiel fremdulo oni ne permesis al mi. Feliĉe denove Esperanto helpis min: mi trovis mian parizan samideanon, generalon Bastien, kiu volonte akompanis min, kaj dank' al lia interveno antaŭ la fabrikestro mi povis viziti kaj trarigardi la tutan fabrikon, vidante tre interesajn maŝinojn.

Kiel membro da UEA mi estis delegito dum multaj jaroj en nia ĉefurbo Sofio kaj mi ĉiam akurate plenumis miajn taskojn ĝis la fino de 1962 j., kiam mi memvole ekŝiĝis de tiu posteno kaj restis nur fakdelegito pri metal-tranĉaj maŝinoj.

Dum mia pli ol 70-jara esperantista vivo, kiel modesta batalanto por nia E-idealo, mi havis la fortan deziron krei vastajn interna-

ciajn rilatojn per Esperanto por la paca kunekzistado de la popoloj. Mi ĉiam uzis la lingvon serve al la fremdaj esperantistoj, por ke ili havu la eblon pli bone ekkoni nian belan landon kaj speciale ĝiajn grandajn sukcesojn en la socialisma konstruado.

Mi finas miajn rememorojn per la vortoj de nia kara majstro Zamenhof diritajn antaŭ la VIII-a UK de Esperanto en Krakov (Pollando) en 1922 j.: „Ne forgesu, ke Esperanto ne nur estas simpla lingvo, kiun ĉiu de ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas ankaŭ socia grava problemo kaj, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu respekton kaj konfidon al ĝi!“

Karaj samideanoj, mi ĵuris antaŭ Zamenhof labori por Esperanto ĝis mia lasta spiro. Kaj mi plenumos mian ĵuron!

FRATAJ RENKONTIĜOJ

De la 17 ĝis la 29 de julio ĉ. j. per speciala „Vagonaro de amikeco kaj paco“ veturis ekskurse al Sovetunio granda grupo de 340 bulgaraj laboravangarduloj k. a. el industriaj entreprenojoj kaj agrikulturaj labor-kooperativoj. Neforgeseblaj estis la emocioj kaj la impresoj de ĉiuj grupanoj, ĉar tutan vivon ili revis viziti kaj per siaj propraj okuloj vidi la grandan landon de la konstruata komunismo, la neŝanceleblan fortikaĵon de la tutmonda paco. Ĉi tie tamen ni ne parolos pri tio, sed pri io alia — pri niaj renkontoj kun sovetaj esperantistoj.

En la ekskursanta grupo estis kelkaj esperantistaj geedzaj paroj: de Ivan Bataklijev el Plovdiv, de Lazar Gajdarov el Karlovo, de Stefan Trifonov el Râjevo Konare kaj verŝajne kelkaj aliaj.

En Rostov ĉe Dono nin renkontis Aleksandro Kasin kun sia edzino. Okazis vigla interparolado, interŝanĝo de memordonacoj k. a. Ŝprucis frataj sentoj, kiuj ĝenerale ligas la bulgaran kaj sovetan popolojn.

En Moskvo ni vizitis la E-klubejon, kie ni trafis kelkajn esperantistojn. K-do Teodor Kulagin, estrarano de Moskva E-Klubo, kore salutis kaj akceptis nin.

Jus estis veninta en la klubejon la veterano de la litova E-movado Antanas Poška el Vilnius. Por ni estis granda ĝojo konatiĝi kun li.

La vesperon en la restoracio de la granda hotelo „Ukraino“, kie noktumis nia grupo, denove okazis renkontiĝo kun sovetaj esperantistoj: venis k-do Boris Tokarev, A. Poška, la juna samideano Viktor. Denove amikaj interparoloj, interŝanĝo de bildkarto, memoraĵoj, adresoj. . .

Ni adiaŭis kvazaŭ ni estis malnovaj konatoj kaj amikoj.

Stefan Darjonov

Interŭjo de As. Grigorov

La hungarlingva gazeto „Békés mag. Népujság“, aperanta en urbo Bekescsaba, publikigis sur tri kolumnoj interŭjon de Asen Grigorov, kiu partoprenis la Someran Universitaton en urbo Gyula. Kiel moto estas cititaj vortoj el la interŭjo: „La ĉefa celo de Esperanto estas la flegado de amikeco inter la popoloj“.

BONA SOMERA PROPAGANDO DE ESPERANTO

K-do Georgi Cvetkov, prezidanto de E-Societo „Albatro“ en Varna, ĉefmekanikisto de motorŝipo „Ječka Karamfilova“, kiu dum la somero provizore naĝis preter la pitoreska nigramara bordo inter la ripozlokoj Kiten kaj Primorsko — Sudorienta Bulgario, bone propagandis Esperanton. Dum la vojaĝado li ornamis la ŝipon per propagandaj materialoj. Dekmiloj da vojaĝantoj legis la afiŝojn kaj interesiĝis pri Esperanto. Sur la foto staras k-do Cvetkov.

Georgi Dimov



La solena inaŭguro de la 58-a UK de Esperanto en Beograd allogis en la ĉefsalonon „Zamenhof“ de la Sindikata Domo ĉiujn kongresanojn — 1638 el 42 landoj kaj rekordan nombron da kongreslandaj, diplomataj kaj urbaj reprezentantoj. Sur la prezida podio sidis gvidantoj de UEA — la vicprezidantoj Erik Carlén (Karlen) kaj Boĵa Popoviĉ, la ĝenerala sekretario Günther Becker, la membroj de la Komitato d-ro J. Wells, d-ro Werner Bormann, E. J. Woessink, la direktoro de la Centra Oficejo d-ro Victor Sadler k. a. Ĉi tie estis ankaŭ la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) prof. ing. Momĉilo Šaponjiĉ kaj oficialaj gastoj, venintaj por saluti la Kongreson: Veljko Milatoviĉ — prezidanto de la Federacia Konferenco de la Socialista Unuiĝo de Jugoslavio kaj reprezentanto de la Alta Protektanto de la Kongreso — la Prezidanto de SFR Jugoslavio, Josip Broz Tito; Blaĵo Jovanoviĉ — prezidanto de la Konstitucia Kortumo de Jugoslavio, Trpe Jakovlevski — ministro en la Federacia Registaro, Jivorad Kovaĉeviĉ — vicprezidanto de la Magistrato de Beograd, Marijan Roĵiĉ — sekretario de la Federacia Konsilantaro de la Sindikata Unuiĝo de Jugoslavio, k. a.

La Kongreson malfermis la prezidanto de LKK prof. Šaponjiĉ, kiu transdonis la parolon por salutoj fare de la oficialuloj.

Salutante la Kongreson Veljko Milatoviĉ, kies funkcio en la sociopolitika hierarkio de Jugoslavio estas tre altranga, en sia sufiĉe longa parolando memorigis, ke tio ĉi estas la dua fojo, kiam la plej alta monda forumo de la E-movado okazas en Jugoslavio (la 38-a UK okazis en Zagreb en 1953) kaj ke en Sarajevo ĵus finiĝis la 29-a Internacia Junulara E-Kongreso. „Ĉion ĉi ni ne klarigas — diris li, — per iaj niaj tradiciaj gastamo aŭ organizkapablo. Ni opinias, ke tio estas antaŭ ĉio esprimo de la evoluo kaj plifortiĝo de Esperanto en Jugoslavio kaj de la socia signifo, kiun nia lando atribuas al la disvolviĝo de Esperanto — por pli facila kaj pli rapida interkompreniĝo, por evoluo kaj plifirmiĝo de la amikeco en la mondo.

... Esperanton kiel lingvon, feliĉe, ne alportas konkerantoj, koloniistoj, la fortaj kaj la potencaj, kiuj ankaŭ sur niaj areoj provadis forpuŝi la naciajn lingvojn. Esperanto estiĝis kaj evoluis el la bezono mem de la homoj kaj popoloj, kiuj parolas malsamajn lingvojn, interkompreniĝi kaj alproksimiĝi. Ĝuste en tiu libervoleco kuŝas ĝia plej profunda, kultura, civiliza kaj humana misio... Esperanto estas la ponto inter la homoj kaj popoloj — la esprimo de iliaj bezonoj, volo kaj deziro.

... Oni devas, laŭ nia opinio, kredi, ke la ankoraŭ ĉiam dividita mondo, dividita antaŭ ĉio per ĉiam pli profunda ekonomia abismo inter la evoluantaj kaj ne-evoluantaj landoj, per monopoloj kaj malegalrajteco, ekkonos la ĝustajn vojojn, kiuj kondukas al superrego de la diferencoj, al plifirmiĝo de la solidareco, kunlaboro, interkompreniĝo, al unu humaneco, sur kiu sola ĝi povas pluvi. Kaj tiam, se Esperanto, kiel ilo de internacia kompreniĝo, kontribuos al tiu granda celo, ĝi pravigos siajn aspirojn esti la dua lingvo por ĉiu homo kaj nacio, kaj la klopodojn, kiujn ni ĉiuj faras tiucele.“

Sekvis la salutparolado de Jivorad Kovaĉeviĉ — vicprezidanto de la Beograda Magistrato, kiu interalie diris:

„La fakto, ke dum la kongreso kaj en viaj reciprokaj kontaktoj vi interkompreniĝas sen interpretistoj, sufiĉe konvinke parolas pri la bezono kaj signifo de Esperanto. Klopodante forigi la lingvajn barojn, vi plenumas humanan kaj utilan mision kaj kontribuas al proksimiĝo kaj interligiĝo de la homoj dis tra la mondo. Samtempe vi ne neas la bezonon lerni la naciajn lingvojn kaj ne senvalorigas la intereson de ĉiu homo ekkoni la kulturon kaj la tradiciojn de aliaj popoloj. La evoluo de la civilizo, progresigo de la komunikrimedoj, ekspansio de la internacia turismo kaj ĉiam pli oftaj kontaktoj de la homoj de la tuta mondo prezentas objektivan antaŭkondiĉon, ke Esperanto fariĝu la lingvo de la estonteco. En tiuj noblaj klopodoj vi havas subtenon de ĉiuj pacamaj kaj bonintencaj homoj en la mondo.“

La Kongreson salutis ankaŭ d-ro Mane Budisavljeviĉ — en la nomo de la jugoslavia Ruĝa Kruco.

La nombro de la diplomatoj, kiuj ĉeestis la solenan inaŭguron de la 58-a UK, estis rekorda: el 21 landoj. En la nomo de la bulgara ministro de eksteraj aferoj Petr Mladenov salutis la Kongreson k-do I. Petkov — unua sekretario de la bulgara Ambasado en Beograd. Salutparoladon faris ankaŭ reprezentanto de l'Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, ĝis nun eble la unua fare de oficialulo de UN.

Impona estis ankaŭ la nombro de landaj E-asocioj, kiuj salutis la Kongreson: 26 aliĝintaj kaj 10 nealiĝintaj al UEA, inter kiuj ankaŭ 3 sovetaj reprezentantoj: Magomet Isaev nome de la sovetaj esperantistoj, prof. Gurgen Sevak — en la nomo de la esperantistoj en la Armena kaj najbaraj sovetaj respublikoj, kaj Jaan Ojalo — nome de la estonaj esperantistoj. En la nomo de la bulgaraj esperantistoj salutis la Kongreson k-do Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA,



Festparoladon antaŭ la Kongreso je temo „Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko“ faris d-ro John Wells (Ĝon Uels) — membro de la estraro de UEA. Li rememorigis la fakton, ke en multaj landoj de la mondo, kie ekzistas multaj lingvoj, ofte iu el tiuj lingvoj, ordinare la lingvo de la plimulto de la loĝantaro, havas superan pozicion, dum la aliaj suferas malrespekton kaj diskriminacion. „Ni, la Esperanto-movado, staras por tolero — emfasis d-ro Wells. — Ni volas vidi laŭeble toleran solvon ankaŭ de internaj lingvoproblemoj... Ni ne volas krude trudi la lingvon de la plimulto, nek altrudi la lingvon de ekstera potenco.“

Menciante pri la laboro de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, kiu fine de junio ĉi-jare eklaboris en Helsinko, d-ro Wells substreki la gravecon de la lingva problemo en la kultura kunlaborado de la eŭropaj popoloj kaj nacioj — reciproka informado kaj informiĝo, kultura interŝanĝo de ideoj, eldonaĵoj kaj ankaŭ personoj, pere de amasa kultura turismo inter la diversaj landoj. Li diris:

„Ni volas agi por solvi la problemon ankaŭ sur persona kaj homa nivelo, por ebligi rektajn kontaktojn kaj individuajn interkonatiĝojn. Ni volas, ke estu kreita kaj flegata inter la popoloj amikeco ne abstrakta, limigita al imponaj frazoj kaj belaj rezolucioj, sed konkreta, kio signifas, ke devas esti starigitaj kaj vivtenataj individuaj personaj interrilatoj. Kaj antaŭkondiĉo por tia evoluo de la internaciaj kontaktoj estas komuna lingvo.“

Al la temo pri la lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko estis dediĉita ankaŭ la dua ĝenerala kunveno de UEA. En ĝi diversnaciaj raportis detale pri la komplika lingva problemo en siaj landoj: d-ro Peter Zlatnar — pri Jugoslavio, Tzaut Oliver — pri Svislando, Guy Matte — pri Kanado, Paul Peeraerts — pri Belgio, d-ro J. Wells — pri la kimra lingvo en Britujo, d-ro Jan Knappert — pri la lingva problemo en Afriko.

En aparta kunveno oni havis eblecon diskuti pri la aktuala temo „Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj“. En ĉeesto de ĉ. 350 kongresanoj raportojn kun diferencaj tezoj pri la temo de la debato tralegis G. Becker kaj E. J. Woessink.

El la vigla diskutado, kiun partoprenis 11 personoj, evidentiĝis, ke la ĝenerale reganta opinio pledas por la konservo de la ĝisnunaj lokaj grupoj, kies agadon oni devas plivigli kaj modernigi.

La kunsidojn de la Komitato kaj Estraro de UEA prezidis la nova vicprezidanto prof. Boĵa Popović.

Oni traktis multajn demandojn — ĉion ĉi oni ne povas tuŝi ĉi tie. Ni atentigos nur pri kelkaj punktoj.

Post longa diskutado la Komitato decidis akcepti la proponon de la Estraro plialtigi la individuajn membrokotiĝojn per unu triono. La kaŭzo: senhalta inflacio en Nederlando kaj en aliaj landoj.

(Sekvas sur p. 10)

KONGRESA REZOLUCIO

La 58-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Beograd de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1973, kun 1638 partoprenantoj el 42 landoj,

konstatas, ke la rezultoj de la Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro, okazinta en Helsinko komence de junio 1973, signas plian paŝon al politika malstreĉiĝo en Eŭropo kaj donas esperon de pli intensa ekonomia kunlaborado kaj kultura interŝanĝado;

aparte aprezas la perspektivojn de la amasa komunikado inter la eŭropaj nacioj kaj unuopuloj sur ĉiuj kampoj, ekde sciencaj kaj intelektaj interŝanĝoj, tra televido, radio kaj gazetaro ĝis kultura turismo kun partopreno de la plej vastaj popoltavoloj;

atentigas, ke pro la granda nombro de naciaj lingvoj kaj lingvoj de naciaj minoritatoj en Eŭropo la Internacia Lingvo Esperanto, kiel neŭtrala instrumento de komunikado ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en mondaj kadroj, povas decide kontribui al la plena realigo de tia kultura programo;

sekve petas la registarojn en eŭropaj landoj kaj la kompetentajn instancojn de eŭropaj institucioj dediĉi seriozan atenton al la lingva aspekto de la kulturaj interrilatoj kaj antaŭenigi la pluan disvastigon de Esperanto kaj ĝian aplikon en internacia praktiko.

Ekde 1974 okazos plua integriĝo de TEJO kun UEA. La celo estas: kompleta integriĝo de la financoj kaj administrado kaj pli proksima kunagado per eniro de TEJO-aktivuloj en la gvidajn organojn de UEA.

La Komitato akceptis novan laborplanon, pri kiu ni donos informojn en iu el la sekvaj numeroj de „BE“.

La Komitato decidis akcepti plian landan asocion en Brazilo — Kulturen Kooperativon de Esperantistoj — kaj aprobis la kontrakton

pri kunlaboro kun plia faka organizaĵo — la asocio „Monda Turismo“.

La Komitato aprobis la proponon de la Estraro pri kongresa rezolucio, kiun la kongresanoj unuanime akceptis en la solena fermo de la Kongreso. Tiun dokumenton ni donas aparte en ĉi tiu numero (paĝo 9).

Informojn pri la fakkunsidoj kaj la artaj aranĝoj de la Kongreso, pri la Internacia Somera Universitato k. a. aperos en la sekva numero de nia revuo.

Kunĉo Văleș

La Sesa Ĝenerala Konferenco de MEM

POST BEOGRADO — AL NOVA PLI FRUKTODONA AGADO!

Nia Sesa Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) jam estas fakto.

La 1-an de aŭgusto dum la tuta tago en oportuna beograda klubejo ni sukcesis fini la streĉitan laborprogramon de la konferenco.

Dank' al la bone preparitaj materialoj de la ampleksa tagordo la kunsido fluis glate kaj sukcesplene.

La frata atmosfero, kiu regis dum la tuta tago de la konferencoprogramo, ebligis ne nur trovi la plej adekvatajn solvojn de la problemoj, starigitaj antaŭ MEM, sed ankaŭ estas signo por pli bone organizita kaj sekve pli fruktodona laboro dum la antaŭstaranta periodo.

La sufiĉe detala raporto de nia ĝenerala sekretario Tomaš Balda pri la aktiveco de MEM dum la lastaj tri jaroj post la V-a Ĝenerala Konferenco en Vieno (1970—1973) donis bazon por afereca kaj enhava diskutado. Estis aprobitaj ĉiuj esencaj punktoj de la raporto kaj la proponita ĝenerala rezolucio.

La raporto de la centra redaktoro de „Paco“ William Gilbert skizis la novajn taskojn de la landaj sekcioj kaj perantoj de MEM lige kun „Paco“, ĝia ĉiuflanka plibonigo kaj distribuado.

La nova IK de MEM havas pli bonan konsiston kaj espereble ni povas ricevi pli grandan aktivecon en la porpaca batalo kiel de la tuta Internacia Komitato, tiel ankaŭ de ĉiu aparta ĝia membro. Estis elektitaj pli multe ol ĝis nun virinoj kaj junuloj.

En la sekretariaro estis reelektitaj la prezidanto, la ĝenerala sekretario, la centra redaktoro kaj aliaj pacamikoj, ĉar oni aprobis ilian ĝisnunan agadon kaj esprimis al ili fidon pri ankoraŭ pli bonrezulta laboro en la sekva trijara periodo.

Novelektitaj estas konataj MEM-aktivuloj por gravaj postenoj en la Sekretariaro: S. N. Podkaminer — por vicprezidanto, d-rino Magda

Ŝaturova — por sekretario, Boris Popov — por centra administranto. Kun entuziasmo kaj emocio estis aljuĝita al la unua grupo da fondintoj kaj aktivuloj de MEM la novekreita honor-insigno de MEM lige kun la 20-jara jubileo de nia nobla movado. Krome estis honoritaj per ĝi ankaŭ la Ĝenerala sekretario de la Tutmonda Packonsilantaro s-ro Romesh Chandra, kiu tre simpatie rilatas al la agado de la esperantistoj-pacbatalantoj, aprezanta ĝin ĉe ĉiu konvena momento kaj ŝatante sincere la kunlaboradon kun MEM sur la areno de la pacbatalo.

Aparte estas notinda la ĉeesto de la dumembra delegitaro de DR Vjetnamio, kiu speciale venis por partopreni la Konferencon. Ambaŭ pacamikoj Dao Anh Kha kaj Nguyen Dihn estis aklame akceptitaj kaj aktive kunlaboris por la sukceso de la Konferenco.

Havigis al la konferencanoj agrablan ĝuon la fakto, ke la ĉefredaktoro de „La verda kolombo“ Kimiaki Kurita povis ankaŭ ĉeesti nian laboron en Beograd.

Konklude, ni povas tutcerte aserti, ke la pasinta dudekjara periodo depost la fondiĝo de MEM dum la furiozanta „malvarma“ milito, la multpromesanta unua periodo de internacia kunlaborado de socialistaj kaj kapitalistaj ŝtatoj en vasta kaj daŭra perspektivo, la leĉoj, eltiritaj de la tuta ĝisnuna agado de MEM, permesos al la Internacia Komitato, al la Sekretariaro kaj al ĉiuj mem-anoj plibonigi sian tutan laboron kaj ŝultro-ĉe-ŝultro kun la ceteraj pacamaj fortoj en la mondo gajni gravajn poziciojn dum la proksimaj jaroj.

Ek al laboro — por novaj pacvenkoj, por disfloro de la nobla Esperantista movado!

El „*Pacaktivulo*“ (informilo de MEM)
n-ro 99/1973 (kun mallongigoj)



LA ĈI-JARAJ KONFERENCJOJ DE ESPERANTISTOJ-PEDAGOGOJ EN MARIBOR

En Maribor, Jugoslavio, ĉi-jare okazis du gravaj konferencoj de esperantistoj-pedagogoj, kiujn partoprenis 7 gebulgaroj. Ambaŭ konferencoj havis siajn kunsidojn en la Alta Ekonomia-Komerca Lernejo de la urbo. Ĉi-sube ni informas pri ilia laboro kaj decidoj.

La VIII Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en la lernejojn (18—20 de julio)

Ĉi tiun konferencon partoprenis 35 pedagogoj el la 5 landoj—Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, kiuj formas la unuan regionon de ILEI. Inter ili estis ankaŭ 13 observantoj pedagogoj el Finnlando, FR Germanio, Nederlando kaj Svedio.

Ĉe la malfermo la Konferenco estis salutita de oficialaj reprezentantoj de la plej altaj klerigaj instancoj de Slovenio (s-ro Peter Vinkler), Serbio (s-ino Olga Radoniĉ) kaj Hungario (s-ino Marta Cser).

La oficialaj reprezentantoj de landaj instruistaj sekcioj faris mallongajn raportojn pri la instruado de Esperanto en la lernejoj de siaj landoj, aparte tuŝante la pedagogian didaktikan eksperimenton (PDE), kiu estis la ĉefa problemo de la konferenco.

Katina Dazzini (Dacini), gvidantino de la Instruista Sekcio en Italio, raportis pri grava sukceso de Esperanto en fundamenta lernejo de urbo Ĉezena: tie la instruistino Taddei instruas devige la lingvon al ĉiuj 330 lernantoj.

Kunĉo Vălev — vicprezidanto de la Instruista Sekcio de BEA, raportis pri la lastaj favoraj al Esperanto paŝoj de la Kleriga Ministerio de Bulgario: ĝi fiksas 5 lernejojn por deviga eksperimenta instruado de Esperanto, kie la E-instruistoj ricevas 50% aldone al sia monata salajro; la Ministerio fiksas ankaŭ specialan kolektivon el E-metodistoj, kiu organizas, observas kaj gvidas la PDE en la lando; la Ministerio eldonis specialan programon por instruado de Esperanto en la lernejoj — ĉu eksperimenta, ĉu fakultativa, ĉu en rondetoj.

La lernantoj el la eksperimentaj klasoj jam tre bone prezentis sin en la Recitalo de Revolucia Poezio, Prozo kaj Kanto en urbo Târgoviște, kie ili gajnis multajn premiojn.

D-ro Peter Zlatnar — gvidanto de la Slovena Instruista E-Sekcio, rakontis pri tre interesa enketo, kiun entreprenis la slovenaj esperantistoj. En la enketiloj ili starigis kvar demandojn: pri E-novaĵoj kaj E-kurso en la programo de la slovenaj radio, televido kaj gazetaro kaj pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La rezulto de la enketo estis tre ĝojiga: 88% el la enketitaj 978 institucioj kaj organizaĵoj (popolaj sovetoj, lernejestroj, sindikataj,

junularaj, sportaj, kulturaj kaj aliaj organizoj) respondis pozitive al la demandoj kaj akceptis esti „amikoj de Esperanto“. Utiligante tiun bonegan rezulton kaj surbaze de la federacia konstitucio la Slovena Esperanto-Ligo ellaboris Deklaracion pri la lingva problemo en la rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj de Jugoslavio, adresitan al la publiko, al reprezentaj institucioj kaj politikaj forumoj, atentiganta ilin pri Esperanto kiel taŭga lingvo por tiuj rilatoj. Rezulte de l'aktiveco de slovenaj esperantistoj 500 instruistoj aliĝis al koresponda kurso de Esperanto.

Traktante la rezultojn de la dujara eksperimenta instruado de Esperanto, la konferenco trovis ilin bonaj. La situacio en la apartaj landoj estas jena:

Hungario — 9 klasoj kun ĉirkaŭ 200 lernantoj;

Jugoslavio — 8 klasoj kun pli ol 200 lernantoj;
Italio — 17 klasoj kun 530 lernantoj;

Bulgario — 5 klasoj kun 116 lernantoj (pli detale: en Popovo — 2 klasoj kun 48 lernantoj, instruistino Vâlka Dankova; en Veliko Târnovo — 1 klaso kun 28 lernantinoj, instruistino Penka Kateva; en v. Temelkovo, distrikto de Pernik — 1 klaso kun 20 lernantoj, instruistino Cvetanka Zareva; en v. Jivkovo — distrikto de Sofio — 1 klaso kun 14 lernantoj, instruistino Stojanka Alaĝova).

Kun granda bedaŭro la konferenco konstatis, ke en Aŭstrio la eksperimento ankoraŭ ne komenciĝis, ĉar la aŭstra Instruistministerio ne akceptis la komune elektitan kaj uzatan en PDE lernolibron de d-ro Istvan Szerdahelyi (Istvan Serdohej).

Pri la praktika aplikado de Esperanto en la kadro de PDE raportis Marin Băcev — prezidanto de la Komisiono, zorganta pri la aplikado. Li diris, ke dum la dua jaro de PDE, paralele kun la kresko de la lingvokonoj de la lernantoj, inter ili komenciĝis E-korespondado, kreiĝas la unuaj kontaktoj.

Por la tria eksperimenta studjaro la konferenco rekomendis, ke oni direktigu al evoluigo de la parolkapablo de la lernantoj; oni plifortigu la inspektoradon, kie tio eblas, kaj reciprokkan vizitadon de pedagogoj, instruantoj en PDE-klasoj; oni pliampleksigu la praktikan aplikadon per korespondado de pedagogoj kaj lernantoj en la kadroj de PDE kaj enkonduku novajn formojn de aplikado, precipe edukcelajn.

La konferenco decidis, ke dum la lasta semajno de 1974 j. okazu internacia tendarlernejo en Ŝibenik, Jugoslavio, kaj en 1975 j. — en Bulgario. Tiam oni demonstru laŭ speciala programo la atingojn de la trijara eksperimenta instruado de Esperanto. Ĉar en Ŝibenik povus partopreni nur po 25 lernantoj el la

5 landoj, por la ceteraj la Bulgara Instruista Sekcio klopodos organizi en 1974 j. tendaron en pitoreska loko.

Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (21—26 de julio)

La konferencon partoprenis pli ol 80 pedagogoj el 16 landoj, inter kiuj ankaŭ el Japanio, Kanado kaj Usono. Malfermis ĝin la vicprezidanto de ILEI, rektoro Helmut Sonnabend. Oficialajn salutojn prezentis la sekretario de la Komunumo de Maribor s-ro Lojze Frangeš — en la nomo de la Komunumo kaj ĉiuj socipolitikaj organizoj en la urbo.

En siaj salutparoladoj la reprezentantoj de landaj sekcioj koncize tuŝis ankaŭ la staton de E-movado inter la instruistoj kaj de la E-instruado en la lernejoj de siaj landoj. La bulgara reprezentanto K. Vălev raportis pri la grava laboro de nia sekcio prepari E-instruistojn el la medio de la profesiaj pedagogoj, ĉar pri ili oni sentas akutan bezonon. Speciale li rakontis pri la jam kvinan jaron organizitaj porinstruistaj, E-kursoj — forestaj (dum la lernojaroj) kaj ĉeestaj (20-tagaĵ, someraj, en u. Burgas), kiuj konstante evoluis — el distrikataj fariĝis tutlandaj kaj ĉi-jare jam internaciaj. Tiuj kursoj (meze po 150 partoprenantoj ĉiusomere) estas forta antaŭenpuŝo de nia E-movado inter la profesia instruistaro, pri kio parolas elokvente ankaŭ la rezultoj dum la lastaj jaroj: en Bulgario Esperanto estas instruata en ĉirkaŭ 120 klasoj kaj kursoj al ĉ. 2000 gelerntoj.

En sia riĉa programo la konferenco traktis ankaŭ du tre interesajn temojn: „La lernejo hodiaŭ“ kaj „La eksterlerneja aplikado de Esperanto“. Estis aŭskultitaj ankaŭ bela prelego de d-ro Mario Dazzini je temo „Enkonduko en la studado de „Dia komerco“ de Dante“.

Gravan atenton la konferenco apartigis al ellaboro de „Dekjara perspektiva plano de ILEI“. Por profunde trastudi kaj pretigi ĝin en definitiva formo estis elektitaj 5 laborkomisionoj kies gvidantoj raportis en ĝenerala kunveno:

Johano Ingusz — pri „Organiza strukturo kaj organoj de ILEI“.

Catina Dazzini — pri „La lerneja evoluo — tezoj pri lernejaj eksperimentoj“;

Kunĉo Vălev — pri „Instruaj demandoj kaj klerigado de la instruistoj“;

d-ro Istvan Szerdahelyi — pri „Scienca Esplor-Instituto de ILEI“.

La raportoj de la komisionoj estis akceptitaj post atentaj pridiskutoj. Ili prezentis vastan intereson kaj ni klopodos en la sekvaj numeroj de nia organo doni pliajn detalojn pri ilia enhavo. Ĉi tie ni citos nur la raporton pri la organiza strukturo de ILEI.

La tuta terglobo dividiĝas je 8 zonoj:

1. Afriko; 2. Norda Ameriko kaj Meza Ameriko; 3. Suda Ameriko; 4. Aŭstralio kaj Novzelandoj; 5. Sudokcidenta Azio; 6. Orienta Azio kun Japanio kaj Filipinoj; 7. Suda Azio kun Indonezio; 8. Eŭropo.

Ĉiu zono dividiĝas je regionoj, ekzemple Eŭropo:

I regiono: Albanio, Aŭstrio, Bulgario, Grekio, Hungario, Italio, Jugoslavio;

II regiono: Belgio, Francio, FR Germanio, Luksemburgo, Nederlando, Hispanio, Portugalio, Svisujo;

III regiono: Britio, Danlando, Finnlando, Irlando, Islando, Norvegio, Svedio;

IV regiono: Ĉeĥoslovakio, GDR, Pollando, Rumanio, Sovetunio.

Ĉiu regiono konsistas el sekcioj.

Oni antaŭvidis, ke dum la venontaj jaroj ekestu internaciaj instruistaj centroj sub la aŭspicio de ILEI en Burgas (Bulgario), Gresillon (Francio), Internacia Domo Sonnenberg (FR Germanio), Internacia Popola Altlernejo en Helsingör (Danlando), Internacia Rondo Sonnenberg (Nederlando).

La konferenco fondis Sciencan Esplor-Instituton de ILEI, kies celo estas lingvo-kultura, literatura, instru-eduka, historia kaj interlingvistika. Nuntempe kiel centro de SEI funkcias la fako „Esperanto lingvo kaj literaturo“ ĉe la Universitato „Eötvös Lorand“ en Budapeŝto sub la gvido de d-ro Szerdahelyi.

Ekde 1974 j. la organo de ILEI — Internacia Pedagogia Revuo — komencos regule aperadi sub la redaktoreco de R. Hauptenthal.

La konferenco en Maribor elektis ankaŭ novan estraron de ILEI en jena konsisto: prezidanto — Helmut Sonnabend (Zonabend) el FRG; vicprezidanto — Johano Ingusz (Ingus) el Hungario; sekretario — Mario Dazzini (Dacini) el Italio; vicesekretario — Gaston Turin (Tjuren) el Francio kaj kasisto — Olle Olsson el Svedio.

Aparta plezuro por la konferencanoj estis ilia vizito en la infantendaro (sur la bela monto Pohorje apud Maribor). La tendaron partoprenis 23 infanoj el Hungario, 10 el Bulgario kaj 2 el Italio. Dum la lastaj tagoj aliĝis ankaŭ kelkaj infanoj el Maribor. Antaŭ la gastoj la infanoj prezentis belartan programon el deklamaĵoj, kantoj, teatraĵetoj, humuraĵoj k. s. Ĝi estis tiel plaĉa kaj kortuŝa, ke la infanoj prezentis ĝin ankoraŭ foje en la urbo surplace antaŭ la konferencejo por la neesperantista publiko.

La konferencoj de esperantistoj-pedagogoj en Maribor pasis sub la signo de klareco kaj unuanimeco pri la taskoj kaj celoj de estonta agado inter instruistoj, de alta entuziasmo kaj preteco labori obstine kaj sindone por plenumi la gravegajn kaj noblajn celojn de la monda organizo de instruistoj-esperantistoj.

K. Vălev



TRA LA E★ MONDO

RADIOJ DE LA VERDA STELO

Ĝis 1961 jaro en la tuta distrikto de Moletai, unu el la plej belaj kaj plej riĉaj distriktoj de Litovio, estis nur du esperantistoj-instruistoj — A. Jagunas kaj M. Vlasova. En la sama jaro tamen pri Moletai eksciis ĉiuj esperantistoj de Sovetunio, eĉ eksterlandanoj. Tie ĉi estis organizita BET (Baltlanda Esperantista Tendaro). La supre menciitaj instruistoj-esperantistoj fariĝis ĉeforganizantoj de la tendaro. Post la tendaro, dum la tuta jardeko en nia distrikto okazis nenio grava, ligita kun Esperanto. La E-movado travivis krizon. Tamen en 1971 jaro ĝi denove ekleviĝis. La verda stelo denove eklumis pli kaj pli hele. Dank' al la obstineco de la prezidanto de la E-klubo ĉe la Instruista Domo en nia ĉefurbo Vilnius kaj lia kolego A. Jagunas, en la distrikta gazeto „Pirmyn“ (Antaŭen) estis publikitaj „Fundamentoj de Esperanto“, konsistantaj el 12 apartaj lecionoj kaj bazaj scioj pri Esperanto kiel lingvo kaj socia fenomeno. La lecionoj enhavis konkursekzercojn, al kiuj reĉis multaj legantoj. La nombro de la esperantistaro en Moletai-distrikto ekkreskis. La gajnintoj en la konkurso estis premiitaj per E-literaturo. Samjare A. Jagunas organizis en la urba mezlernejo kurson de Esperanto por instruistoj kaj samtempe instruas fakultative Esperanton al lernantoj. La E-movado ekprosperis vigle en alia mezlernejo-internulejo, kiam en ĝi komencis labori la instruisto B. Matiukas, fidela kaj aktiva verdstelano, al kiu mi restos eterne danka, ĉar li esperantigis min. La rondeto, gvidata de li, aranĝis E-anguleton en la urba biblioteko (legejo). Ĉiuj gelernantoj povis ĝu regule aperatan murgazeton „Juna esperantisto“ en litova lingvo. Ĉi-jare kaj pasintjare estis aranĝitaj du grandaj propagandaj amuzvesperoj en tutlerneja skalo. La E-rondeto delegis siajn reprezentantojn al la V-a konferenco de la litova E-lernantaro, okazinta en Panevežis. Kelkaj ĝiaj membroj partoprenis la li-an E-kunvenon-seminaron en urbeto Dotnuva-Akademija (distrikto de Kedainiai). La aŭtoro de tiuj ĉi linioj sukcesis viziti la tendaron de la junaj soveta esperantistoj en Apudmoskvo. Ĉiu rondano abonis iun E-revuon, 17 — „Bulgaran Esperantiston“. Regule okazas rondetkunvenoj. La E-rondeto ĉe la internulejo havas

variajn ligojn kun aliaj E-rondetoj kaj kluboj, kelkaj en eksterlando. Ni konstante korespondas kun Pola Radio (Esperanto-Redakcio), ĉiutage disaŭdiganta esperantlingve, kun Centra Laborrondo Esperanto de GDR, al kiu ni esprimas treege elkoran dankon pro ĝia helpo al ni per E-literaturo. Niaj membroj partoprenis la konkurson de Pola Radio. En ĵ. „Pirmyn“ aperis traduko el Esperanto de fragmento el „La drinkejo de l'mutulo“ de vjetnamia verkisto Nguen Sang. Pri Esperanto en la mondo kaj en nia distrikto kaj internulejo la sama distrikta gazeto aperigis materialojn (krom la lecionojn).

Egorov Paŭlo, Litovio.

LA PLEJ BONA KLUBO

El Latvio el la 15-a tutsovetia konferenco de esperantistoj, venis en Ufa la jena lakona telegramo:

„Ni gratulas al vi la unuan lokon!“

Post dujara paŭzo la esperantista klubo en Ufa denove gajnis la unuan lokon en la konkurado inter la junularaj E-kluboj en la lando kaj estis premiita per la Transira Vazo.

La kluba agado dum la pasinta lernojaro estis tre varia: interesaj kunvenoj, ekskursoj, amasa partopreno en tendaroj kaj labortaĉmentoj de esperantistoj, vasta korespondado kun eksterlando, multnombraj rondetoj kaj ĉeestaj kursoj, publikaĵoj en la gazetaro, verkado de kelkaj dekoj da novaj E-kantoj, ekspozicioj, lekcionoj, koncertoj, amuzvesperoj por la loĝantaro, abonigo por 200 ekzempleroj de E-gazetoj, organizo de la 7-a konferenco de la uralaj esperantistoj kun granda nombro de partoprenantoj, televida emisio, havigo de novaj libroj por la klubeja biblioteko kaj por la klubanoj, preparo de diafilmoj pri la E-kunvenoj k. a.

Boris Kolker

PLI OL 300 ARTIKOLOJ EN „DER MORGEN“

La organo de Liberal-demokratia Partio de Germanio (LDPD) en GDR „Der Morgen“ (Mateno) ekde 1965 j. regule ĉiusemajne kaj ekde 1968 ĉiun duan semajnon (ĉiam dimanĉe) publikigas Esperanto-angulon. La 300-a E-anguleto aperis la 17-an de junio 1973.

Verŝajne „Der Morgen“ estas unu el la multaj taggazetoj aŭ eĉ sola en la mondo, kiu pli ol 7 jarojn regule aperigas konstantan rubrikon pri kaj en Esperanto. En tiu rubriko aperis du kursoj por Esperanto, multaj principaj artikoloj pri Esperanto, pri ĝia signifo, praktika apliko k. t. p., informoj el la E-movado k. a.



GRANDA SUKCESO DE ESPERANTO EN NIA LERNEJO

De oktobro 1972 en la lernejo „Oltresavio“ en Cesena (Cezena) funkcias eksperimento pri tuttaga lernejo. En Italujo kutime la lernantoj vizitas la elementan lernejon nur matene de la 8,30 ĝis 12,40. En la tuttaga lernejo ili iras tagmanĝi hejmen aŭ restas tagmanĝi ĉe la lernejo, pagante tre malgrandan sumon. Posttagmeze ili havas aliajn studhorojn, nature malpli pezajn ol matene. Ekzemple en la lernejo „Oltresavio“ oni enkondukis kiel kromajn lernobjektojn: desegnadon, gimnastikon, manlaboron, recitadon kaj plie fremdan lingvon.

La direktoro de nia lernejo konsultis la gepatrojn de la lernantoj pri la elektenda lingvo. La plejparto proponis anglan lingvon, kelkaj — la francan kaj unu esperantista patro proponis Esperanton, montrante la avantaĝojn. La direktoro ne konis Esperanton, sed tamen interesiĝis pri la propono precipe pro la jenaj konsideroj: la internacieco de Esperanto kaj propedeŭtiko por lernado de aliaj lingvoj. Li do decidis eksperimente enkonduki Esperanton en sian lernejon. Oni komencis tion inter multaj duboj kaj skeptikecoj flanke de la tuta lernantaro, sed baldaŭ la afero entuziasmigis ĉiujn, precipe pro la internacia korespondado. La direktoro baldaŭ rimarkis la pozitivan influon de Esperanto por la alproprigo de la itala lin-

Ni ZECENZAS

NETAKSEBLA DONACO DE NIAJ VJETNAMAJ AMIKOJ

„La bambufluto“. Novelaro el Sud-Vjetnamio. Tiel estas titolita nova Esperanta libro, 207-paĝa, kiu antaŭ nelonge estas eldonita en Hanojo. Niaj vjetnamaj samideanoj ree donacis al ni beletran kolekton de mirinde belaj naŭ noveloj.

Oni ne povas ne emociiĝi legante, kiel la delikata kaj tenera knabino Fok, „La sovaĝa floro“, sub bruliga suda suno aŭ sub tropika pluvego, tage kaj nokte, sub uragano de malamikaj kugloj kaj obusoj, trans montoj kaj ravinoj, trans akvo kaj koto, senlace gvidas la longan kolonon de batalantoj de la liberiga armeo al la batalpozicio.

Aŭ jen voĵgvidisto, la dudekjara knabo Tru-

*La prezidanteco de la pedagogia kunveno.
Parolas M. Dazzini — la sekretario de ILEI.
Dekstre de li sidas la instruistino Fr. Taddei*

gva strukturo. Akceptita libere de la lernejestro, sed deviga por la lernantoj, Esperanto ricevis 14 klasojn, nome la triajn, kvarajn, kvinajn (geknaboj 8—9—10-aĝaj, 330 entute). La korespondado kun 11 landoj estis la kerno de tuta instruado (bedaŭrinde el kelkaj landoj ne venis respondo). La lernantaro montris preferon al la individua korespondado. Ĉiuj estis tre feliĉaj, kiam ili povis havi personan leteron aŭ bildkarton por montri ĝin al siaj familianoj kaj amikoj.

Dum la lernojaroj kelkaj fremdlandaj esperantistoj vizitis la lernejon kaj la lernantoj preparis intervjuon kun ili. Ankaŭ kelkaj lernantoj gastigis en siaj domoj geknabojn el Jugoslavio dum unu semajno. Ili travivis kune interesajn sep tagojn, vizitante la urbon, farante ekskursojn al la apudaj urboj kaj al la malgranda respubliko Sankta Marino. Dum la semajna restado de la jugoslavaj geknaboj en la urba salono de Cesena okazis pedagogia kunveno pri la valoro de Esperanto en la lernejo. Ĉeestis reprezentantoj de pluraj instancoj. La jugoslavaj kaj italaj geknaboj kune prezentis skeĉojn kaj humuraĵojn. Tio multe entuziasmigis la infanojn kaj interesigis la ĉeestantojn, kiuj konkrete povis sperti la utilecon de Esperanto en la internaciaj rilatoj.

E

Franca Taddei

Ĝojiga novaĵo el Sovetunio

En gazeto „Leninec“ aperanta en 130 000 da ekzempleroj en urbo Ufa, USSR, estas publikigita la interesa artikolo „La lando, kiu ne troviĝas sur la mapo“ (temas pri Esperantujo), verkita de la konata soveta esperantisto Boris Kolker. Post ĝi la sama gazeto komencis publikigi 12-lecionan kurson de Esperanto.

ong Dai, kun sia nedisigebla bambufluto, sentime kaj tute neglektante la morton, arde malamante la kruelajn agresantojn, multfoje erarigas ilin, pafmortigas per sia karabeno dekojn da jankioj kaj iliaj vjetnamaj marionetoj, kaj kiam la malamikoj kaptis lin, brave sin ofertas por la patrujo.

Jen alia neforgesebla bildo. La partizaninoj kun armiloj enmane atakas la jankian pupan postenon. Inter ili estas la heroino de la liberiga armeo Nguyen Thi Ut. En la apuda vilaĝo restis kvin ŝiaj gefiloj. Ilin flegas la pli aĝa sepjara filineto Be. La infanoj ludas „je lernejo“. La analfabeta Be imitas instruistinojn, ŝiaj gefratoj estas „lernantoj“. Ŝi tirsilabumas



EL LA POEMO „SEPTEMBRO“

de Geo Milev

I

La nokto naskas el morta utero
de l'sklavo malnovan koleron:
— ruĝan, furiozan,
grandiozan.

Profunde en nokta nebul'.

En valoj malhelaj
— en horo tagiĝa —
el ĉiuj montaroj
el densaj arbaroj
el kampoj senfruktaj
el kotaj urbetoj
vilaĝoj
kaj urboj
el kortoj
kabanoj
fabrikoj, tenejoj, stacioj
grenejoj
bieno
muelejoj
laborejoj
uzinoj
kaj minoj:
sur vojoj kaj vojkurbiĝoj
alte
sur ŝtondeklivoj, rokoj, ravinoj
kamplimoj
kaj suproj
tra valoj sensunaj
tra flavaj arbaroj aŭtunaj
tra ŝtonamasoj
akvejoj
malklaraj kanaloj

herbejoj
fruktoĝardenoj
grenkampoj
vitkampoj
ŝirmejoj por ŝafoj
kratagoj
brulintaj stoplaroj
dornejoj
kaj marĉoj:
ĉifone vestitaj
malpuraj
malsataj
malserenaj
malgrasaj pro ekspluato
krudaj pro varmo kaj frosto
degenerintaj
kriplaj
vilharaj
nigraj
nudpiedaj
gratvunditaj
simpluloj
sovaĝuloj
koleraĵ
rabiaj
— sen rozoj
kaj kantoj
sen muziko kaj tamburoj
sen klarnetoj, timpanoj kaj gurdoj
kornoj, trombonoj, trumpetoj:
surdorse kun sakoj ĉifonaj
en manoj — ne spadoj brilantaj,
sed simplaj bastonoj,
kamparanoj kun stangoj
kun vergoj

kvazaŭ abocolibron: „Serĉi kaj ekstermi jankiojn kaj pupojn. . . “ („Dum foresto de panjo“ de Nguyen Thi).

Koncize, sed sukoplene estas vidigita la popola vivo dum la ege suferiga milito en la rakonto de Phan Vo „Ĉe rando de bombotruo“: la kamparaninoj reirantaj de bazaro, la gaja areto da petolemaj knaboj kaj la lirika rendevuo de du gejunuloj, la reciproka amo de kiuj estas tute ĉasta, pura kiel fontoakvo, kaj la koroj de kiuj flamas por batali kontraŭ la agresantoj.

Aparte kun granda arteca forto estas verkita de Anh Duc la novelo „Rakonto pri mia sanavilaĝano“. Li vortpentras la figuron de la dudek jara heroo de la liberiga armeo Noi, sanitaristo de ĉefronta hospitalo, kiu helpate de flegistino Hong (ambaŭ troviĝas en subtera

ŝirmejo) batalis dum sep horoj kontraŭ pli ol dudek malamikojn kaj ties dekkvin kiras-ĉaroj. La kruelaj banditoj verŝis en la ŝirmejon benzinon kaj ekbruligis ĝin. Noi dum la batalo perdis la dekstran brakon, estis multloke vundita, tamen ne kapitulacis. Per memfabrikitaj grenadoj li mortigis pli ol dek puspoldatojn, difektis du kiras-ĉarojn kaj igis la malamikojn retiriĝi. Ĉiuj vunditoj de la hospitalo estis ŝirmitaj en la tranĉeo kaj restis vivaj.

Ankoraŭ longe la vjetnamaj verkistoj skribos pri la nacio-savanta milito. Sed sendube baldaŭ aperos ankaŭ verkoj pri la paca vivo, pri la cikatriĝo de la militvundoj, pri la socialisma konstruado sur la libera vjetnama teritorio.

Dankon al vi, vjetnamaj fratoj!

Jakov Vlasov, Ŝadrinsk, USSR

kun fosiloj
 kun pioĉoj
 kun fojnoforkegoj
 kun hakiloj
 kun klaboroj
 kun falĉiloj
 kaj trunkoj sunfloraj
 — junaj kaj maljunaj —
 alkuris el ĉiu angulo
 simile al grego
 da bestoj senvidaj —
 multnombraj
 koleraĵoj virbovoj
 kriaĵoj
 hurlante
 (post ili — la nokta granita kupolo)
 atakis kun forto
 sen ord'

nereteneblaj
 minacaj
 grandiozaj:
 popolo!

2

La nokto ŝutiĝis en briloj
 sur la montosuproj.

La sunfloroj
 rigardis la sunon!

L'aŭroro
 vekigis

ĉe pafado mitrala
 de malproksimaj
 deklivoj

— bato post bato —

ekklakis
 frenezaj
 kugloj el plumbo.

Kanonoj —
 elefantoj faŭkantaĵoj —
 ekmuĝis...

Teruro kaj tremo.

Kaj falis en polvon sunfloroj
 kun ĝemo.

3

Voĉo popola:
 voĉo dia.

Per miloj da sabroj

pikata
 popolo —

premata
 humiligata

pli mizera ol almozulo,
 restinta

sen cerbo

sen nervoj —

ribelis

el la nokto alarma

de sia vivo mizera

— kaj skribis per sango varma:

LIBERA!

Ĉapitro unua:

SEPTEMBRO

Voĉo popola —

voĉo dia.

Ho dio!

Apogu la sanktan aferon
 de l'kruda kaj nigra manpar':
 kuraĝon

en koron vi verŝu sen ŝpar':

neniun deziras vi sklav' —

kaj jen — ni ĵuras je nia tomba kav':

la homon revivigos ni

libera en la mondo.

Antaŭ ni staras la morto —

ĝi staru!

Sed transe:

Kanaan' tie floras

de l'Just' promesita

al ni —

eterna printempo de l'revo vivanta...

Ni kredas! Ni scias! Ni ĝin deziras!

Kun ni estas dio!

4

Septembro! Septembro!

Ho sanga monato!

De supreniri

kaj disrompi!

Unua ribelis Măglij*

Stara

kaj

Nova Zagora

Ĉirpan

Lom

Ferdinand

Berkovica

Saranbej

Medkovec*

(kun popo Andrej**)

— vilaĝoj kaj urboj.

5

La popolo ribelis —

kun martelo

en mano,

kovrita de fulgo, fajreroj, skorio,

— kun rikoltilo surkampe,

trasorbita de frosto kaj pluvo:

homoj de l'nigra laboro

kun senparola pacienco —

(ne viroj de l'scienco

talentuloj

protestantoj

* Măglij (kaj la sekvaj nomoj) — urboj kaj vilaĝoj en Suda kaj Norda Bulgario.

** Popo Andrej Ignatov — pastro el vilaĝo Medkovec en Nord-okcidenta Bulgario (nun en distrikto de Miĥajlovgrad), partoprenis aktive la ribelon. Post ĝia frakaso li estis pendumita de la faŝistoj sur telegrafa fosto.



oratoroj
agitantoj
fabrikmastroj
pilotoj
pedantoj
verkistoj
generaloj
posedantoj
de lokaloj
muzikistoj
kaj nigraj faŝistoj).
Sed

kampuloj
laboristoj
krudaj simpluloj
senhavuloj
malkleraj
profanantoj
almozuloj
virapoj

— bestsimila
multmila
amaso
popol':

miĵoj da kredoj
— kredoj je sia leviĝ',
miĵoj da volo
— volo je vivofeliĉ',
miĵoj da koroj sovaĝaj
— kaj en ĉiu kor' flamo,
miĵoj da nigraj manoj
en rondo ruĝa de l'vasto,
levintaj impete supren

la ruĝajn
standardojn
flirtantajn
super la tuta lando
skuata en trem' kaj tumulto —
frukto kolera de l'ŝtorma bol':
miĵoj —
amaso —
popol'?

8

La unuaj falis
en sango.
La impeto ribelan
oni renkontis per kugloj.
La standardoj ekstremis
kugloboritaj.
La montaro tondris ...
Jen supre
montetoj proksimaj kaj foraj
nigriĝis de homaj figuroj
— rampis
nirgaj kolonoj:
regulaj dungosoldatoj
kaj furioza milico...
Ili nur scias:
„La patrujo
en danĝero!“

Bonege:

sed — kio estas patrujo? —

Kaj bojas kolere
la maŝinpaŝiloj. . .

La unuaj
falas en sango.

Trans malproksimaj
montpintoj
ektondris artilerio.

Ektremis

vilaĝoj
kaj urboj.

Mortaj korpoj

— sangaj kadavroj —

jen kovris

deklivojn,

montvalojn

kaj vojojn.

Kun sabroj eltiritaj

kavaleri-taĉmentoj persekutis

kamparanojn venkitajn —

finmortigatajn, pafatajn

per ŝrapneloj, obusoj

— terurite fuĝantaj en diversaj direktoj,

atingatajn en la domoj

kaj tie dishakatajn

per sangaj sabroj

sub remizo malalta

ĉe plorego senhalta

de teruritaj maljunulinoj,

infanoj, virinoj. . .

— — — — —

11

— — — — —

Fino.

La uragano forpasis.

La ŝtormo

ĉesis finfine:

paco

kaj silento

ekestis

en la tuta

lando.

Sanga ofer' al la dioj.

— — — — —

12

— — — — —

Morto, murdo kaj sang'!

Ĝis kiam, ĝis kiam?

Ĉiopova vi Zeŭso

Jupitero

Ahuramazdo

Indro

Tot

Ra

Jehovo

Cebaot:

— Respondu!

Tra la fum' de l'incendioj

sin levas ĉielen



kaj batas orelen
de l'murditoj la krioj,
la ĝemoj
de sennombraj martiroj
sur brulantaj ŝtiparoj en tremoj:
— kiu
trompis nian kredon?

Respondu!
Vi silentas?
Ne scias vi?
— Ni scias!
Jen vidu:
per salto
ni rekte atingas al la ĉielalto:
for dion!

— Per bombo vian koron ni ŝiras,
per sturm' la ĉielon konkeras:
for dion!

Kaj de via tron'
ni elĵetas vin morta malsupren
al la profund' universa

senstela —,
malhela —

for dion!

Tra pontoj ĉielaj
altegaj sen fin'
per ŝnuroj, ferstangoj
ni portos la landon edenan
malsupren
sur la ĉagrenan
de sango plenplenan
terglobon.
Ĉio skribita de filozofoj, poetoj —
realiĝos!
Sen dio! Sen mastroj!
Septembro estiĝos maj'!
La homa vivo
estos senhalta suprenir'!
— Nur supren! Nur supren!
La tero estiĝos eden' —
estiĝos!

(1924)

El la bulgara tradukis:

*Hristo Gorov — Ĥrima,
David Sasonov*

BLANKA NOKTO

de Prodan Prodanov

Tiu septembra nokto estis neordinare hela. La luno lumigis la tutan teron kaj pro tio la stratlampoj de la urbeto flagris mizere. Ili ne povis konkuradi la lunon.

Kvieta kaj silenta estis la urbeto. Nenio en ĝi memorigis, ke nur antaŭ kelkaj tagoj ĉi tie okazis ribelo. En la komenco la ribelintoj triumfis, proklamis laboristan-kampanon sociordon kaj, por granda ĝojo de la plimulto el la urbanoj, arestis la fiulojn. Sed tiu ĝojo ne daŭris longe: soldatruoj kaj „ŝpic-komandoj“^{*} atakis la urbeton kaj disbatis la ribelintojn. Kion fari? La armiloj de la disbatitaj tute ne sufuĉis.

En la vilaĝoj tamen kaj en iuj najbaraj urboj estis maltrankvile. Evidentigis: tie la ribelintoj regas la situacion.

Tage la urbanoj de la menciita urbeto aŭskultis la neoficialajn sciigojn pri bataloj kaj kruelaĵoj. Vespere ili ŝlisis la pordojn kaj longe, longe ne povis ekdormi. Tiam la urbeto iĝis kvazaŭ dezerta. Nenia vivo-

signo! Eĉ la hundoj ne kuraĝis boji.

Sur la stratoj patroladis soldatoj. La bruo de iliaj ferumitaj botoj eĥis dum tiu kvieta kaj blanka nokto. La ŝtalaj klingoj de iliaj bajonetoj timige brilis. La soldataj koroj estis premitaj pro timo kaj konscienciproĉoj. Ili estis pafintaj kontraŭ siaj fratoj kaj patroj. La nescio, kiom longe daŭros tiu afero, pezis sur iliaj animoj kaj paralizis iliajn pensojn.

Sed la soldatoj ne estis la nuraj homoj sur la stratoj. Se ili estus pli atentemaj, ili povus malkovri tri homfigurojn, kiuj intence elektadis la malmajn flankojn de la stratoj. Tio estis triopo da junuloj. Ili portis ion pezan. Pro ĝi kaj pro singardemo ili spiris malfacile. Iliaj koroj batis ĝis krevo. Unu el la junuloj estis vestita en gimnazia mantelo. La alia havis uniformon de poŝtisto. La tria, civile vestita,

Ŝpic — germanlingve „spitze“: speco de hundoj. Tiel la laborpopolo nomis malame la trupojn, kiujn la faŝista registaro sendis al urboj kaj vilaĝoj por aresti, turmenti kaj mortigi progresemaĵn homojn.



estis teknikisto en riparejo por traktoroj kaj draŝiloj. Kaŝe de sia mastro kaj kolegoj li forportis keston kun seruristaj kaj teknikistaj instrumentoj.

Longan tempon la triopo kaŝludis kun la patroloj. Finfine ili atingis la urban periferion kaj de tie direktiĝis al la fervojo. Nun ili ekspiris senĝene.

— Kia perfida luno! — diris la gimnaziano kaj insultis ĝin.

— Ne akuzu la lunon, ĉar dank' al ĝi ni plenumos nian taskon sen lanterno — rediris la teknikisto bonanime.

Dum la tago fervojisto sciigis al siaj kolegoj, ke en Ŝumen oni kunmetis specialan vagonaron por transporti grandan puntaĉmenton konsistantan el regulaj soldatoj kaj blankgardianoj, ekloĝintaj en Bulgario tuj post la revolucio en Rusio. La fervojisto rakontis pri mortsemantaj armiloj: mitraloj, minjetiloj, kanonoj. La plimulto el la fervojistoj decidis malhelpi la transporton. Subite tamen ĉiuj fervojstacioj estis okupitaj de soldatoj, kaj oficiraj komandantoj komencis kontroli la trafikon. Kaj ĉar la malbono ordinare ne venas sola, oni arestis la suspektindajn fervojistojn. La estroj de la fervojstacioj devis obei al la komandantoj kiel dum milita tempo.

Tiam la menciitaj tri junuloj decidis difekti la fervojon kaj ne permesi pluan veturadon de la trajno kun la puntaĉmento.

La fervojo estis zorge gardata, sed estis loko, kie la kuraĝo malfidis al la gardantoj. Tio estis la fervojkurbigo apud la arbaro. Tie la patroloj evitis kontroli pro timo de embusko flanke de la disbatitaj ribelantoj. Ĝuste tien iris la triopo. Jen ili atingis la fiksitan lokon kaj eklaboris energie. La tempo estis valora kaj ĉia prokrasto — danĝera. La teknikisto agis lerte kaj fakule. Liaj kamaradoj helpis lin. La ŝraŭboj estis demetitaj kun enviinda rapideco. Venis la vico de la grandaj feraj konoj, kiuj firmigis la relojn al la ŝpaloj. La junuloj eligis ilin tre malfacile,

samkiel dentistoj, kiuj eligas dentojn havantajn obstinajn radikojn. La manplatoj de la gimnaziano vundiĝis ĝis sange, sed li ne cedis. Ĉiuj laboris senĉese kaj sentis sin kiel en ŝvitbanejo.

La saman tempon la komandanto de la fervojstacio, rezerva kapitano, eliris el sia ĉambro por spiri freŝan aeron. Malbonhumoro obsedis lin. Li ĵus kartludis kun iu polica agento kaj malgajnis grandan sumon. Tio efikis al li amare. Li ekfumis cigaredon kaj ekplandis sur la kajo. La uniformo sufokis lin. Post la milito li dikiĝis. Advokato profesie, li havis reputacion de juristo, kiu praktikas malbone.

Nun li fumis nerve kaj de tempo al tempo tuis raŭke. Subite li ĵetis la cigaredstumpon kaj piedpremis ĝin. Ja bruo altiris lian atenton. La reloj transdonis ĝin. Tio ne estis la konata ritma bruo, avertanta pri baldaŭa alveno de vagonaro. La kapitano rigardis sian poŝhorloĝon. Estis tre frue por kiu ajn trajno. Suspektante ion misordan la kapitano vokis la serĝenton kaj demandis lin:

— Kiom da liberaj soldatoj ni havas?

— Ses homojn, sinjoro kapitano, — respondis la serĝento.

La kapitano ordonis al li flustre:

— Armigu ilin komplete kaj esploru la fervojon atente! Vi devas malkovri la kialojn de tiu bruo! Ĉu vi aŭdas ĝin? — La kapitano montris la relojn.

La serĝento estis trinkinta multe da brando kaj lia kapo zumis kiel telegrafa fosto. Malgraŭ tio li aŭdis klakon.

— Se estas sabotantoj, kaj ne multaj, vi agu meminiĉate! — diris la kapitano.

— Ĉu mi arestu ilin?

— Nenia aresto! Tuj mortpafu ilin! Se la grupo estas granda, vi sendu soldaton por voki helpon!

— Jes, sinjoro kapitano.

La serĝento estis strikte obeema. La estra ordono estis por li sankta. Krom tio, li aspiris al ĉefserĝentaj epoletoj.

Pro sia idealo li estis preta neniigi la tutan mondon. La nuna situacio disponigis al li okazon prosperi.

Li vekis la soldatojn kaj post iom da tempo alkondukis ilin tiudirekten, de kie venis la bruoj. Ĉiuj portis la karabenojn pafpretaj. La reloj respegulis la lunradiojn kaj blindige brilis. La klako laŭ la relpado igis pli kaj pli aŭdebla. La soldatoj marŝis silente kaj senbrue.

Jen — la grupo proksimiĝis al la triopo. La serĝento flustris ion kaj ĉiuj alteriĝis kaj komencis rampi kiel vermoj. Ĉiu klopodis kaŭzi nenian bruon.

La junuloj ĉesigis la laboron por momento kaj viŝis la ŝvitantajn vizaĝojn.

— Io konfuzas min! En tiu vagonaro, kies katastrofon ni pretigas, estas filoj de laboristoj kaj de vilaĝanoj. Ili ne kulpas, ke iliaj oficiroj ordonas al ili pafi kontraŭ niaj... — diris la poŝtisto.

— La leĝoj de la revolucio malagnoskas mizerikordon! Ĉia sentimentaleco estas superflua! — la gimnaziano admonis lin.

— Pli bone pereu la puntaĉmento ol niaj ribelantoj! — konkludis la teknikisto.

* Tio estis iliaj lastaj vortoj.

— Fajron! — ekkriis la serĝento kruelvoĉe.

La fajro de sep pafiltuboj forprenis la vivon de la junuloj.

La agonianta poŝtisto estis finmortigita per la bajonetoj.

Multaj jaroj forpasis de tiam. Modesta, blanka monumento markas la lokon, kie la tri junuloj provis malebligi la transporton de la puntaĉmento. Somere ruĝaj papavoj floras ĉirkaŭe. Ili kvazaŭ memorigas pri la verŝita juna sango.

II premio de la Jubilea Literatura Konkurso

VIVAJ ENTERIGITOJ

de Simeon Ĉirpanliev

Post la pogromo de la Septembra Ribelo en 1923 jaro multaj vilaĝanoj kaj laboristoj, persekutitaj de la faŝistaj potenculoj, retiriĝis en la montaron kaj formis partizanajn trupojn. Policaĵ banditoj kaj faŝistaj oficiroj kun soldatoj ĉirkaŭadis tra la vilaĝoj por ĉasi restintajn komunistojn kaj agrarpartianojn.

La juna 24-jara instruisto Rosen Ĵelezov havigis nutraĵon kaj informojn al la partizanoj en la regiono de kelkaj vilaĝoj. Por kaŝi sian agadon li malfermis kursojn de Esperanto en sia kaj en la najbaraj vilaĝoj. La distrikta lernejinspektoro malpermesis al li gvidi la kursojn motivante, ke Esperanto estas komunista lingvo. Sed Rosen ne timis kaj daŭrigis sian laboron. Li kaj aliaj esperantistoj skribis leterojn al eksterlando kun informoj pri la krimoj de la bulgaraj faŝistoj.

La polico suspektis la instruiston-esperantiston, sed komence ne havis sufiĉe da faktoj pri lia agado. Iom post iom tamen ĝi kolektis tiajn faktojn.

Antaŭ la domo de Rosen haltis granda tegita militkamiono. El la ĉelo de la ŝoforo eliris ĉefserĝento Ĉernosmokov kaj leŭtenanto Sotirov. Ili maldekurate frapis sur la pordon. Eliris la maljuna patrino de Rosen.

— Kiun vi serĉas?

— Ĉu estas tie ĉi avo Ĥristo? — demandis Ĉernosmokov.

— Ho, Ivan, ĉu vi estas?

— Mi estas, avino Pena.

— Nia homo. Bonan venon! Kial vi serĉas mian edzon?

— Estas necesa al ni.

Apenaŭ nun avino Pena vidis, ke Ivan ne estas sola. Kaj respondis:

— Li ne estas hejme.



— Kaj viaj filoj, Stojan kaj Donĉo ?
— Ne, ambaŭ foriris al Sofio serĉi laboron.

— Bone. Sed la instruisto, ĉu li ne estas hejme ?

— Ne, li ankaŭ iris Sofion, — mensogis la avino.

— Kaj via bofilino Minka, la esperantistino ?

— Ŝi iris al kuracisto en la urbo, — denove mensogis avino Pena, ĉar ŝi jam komprenis, ke tiuj homoj ne venis por bono.

Ŝi estis aŭdinta, ke multaj vilaĝanoj el la najbaraj vilaĝoj estas arestitaj kaj forportitaj per kamionoj al la militkazerno en la urbo. Dio mia!

Dum ili parolis, en la fundo de la strato aperis Rosen. Vidinte la kamionon li tuj komprenis la situacion, faris provon forkuri, sed ne sukcesis. La ĉefserĝento ekkuris kontraŭ lin kun revolvero enmane kaj ekkriis:

— Levu la manojn! Vi estas arestita!

— Ne estas kaŭzoj, por ke mi estu arestita.

— Marŝu antaŭ ni! Se vi kontraŭagos, mi pafos.

Vidinte tion la patrino plore kriis:

— Lasu lin! Li ne estas komunisto.

— Se li ne estas komunisto, li estas esperantisto. La afero estas la sama. Ili ĉiuj agas kontraŭ la nova registaro kaj la reĝo.

La patrino ploris. La pordo de la kamiono malfermiĝis. Rosen ekkriis:

— Ne ploru, panjo! Saluton al paĉjo kaj al miaj fratoj!

La patrino kaptis la ĉefserĝenton kaj kriegis:

— Mi ne donas mian belan filon! Ivan, liberigu lin!

— Lasu min!

— Mi ne lasos vin! Mi sufokos vin, venena serpento!

Kaj ŝi kaptis la kolon de la ĉefserĝento per siaj du manoj. Malfortaj virinaj manoj, kiuj nun premis kiel tenaĵo. Patrinaj manoj.

Sed la leŭtenanto forte frapis sin per sia revolvero surkapen. Ŝi falis teren, senkonscia, duonmorta.

La kamiono brue ekveturis al la kazerno de la urbo.

En la domo de Rosen la lumo estingiĝis. Minka kaj la patrino ploris tage kaj nokte. Ili farigis ombroj. La parto-penis konsoli ilin, sed ankaŭ li sekrete ploris kiel infano en iu angulo de la domo. La triopo atendis, atendadis sciigon de la kara Rosen. Sed sciigo ne venis. Ĝisfine elturmentitaj pro malĝojo, Minka kaj ŝia bopatro decidis iri en la kazernon de la urbo. Tie oni respondis, ke Rosen ne estas en la kazerno, sed en la malliberejo de Sofio. Ili veturis al Sofio. Rosen ne estis ankaŭ tie. „Eble en la malliberejo de Sliven“ — aludis iu. Sed ankaŭ tie ili ne trovis Rosen. Dum kelkaj monatoj ili vane veturis de malliberejo al malliberejo, de kazerno al kazerno. Sed Rosen estis nenie.

La patrino konstante ploris antaŭ la ikono de la dipatrino kaj petis dian favoron. La dipatrino silentis. Ŝi estis malforta antaŭ la kruelaj leĝoj de la tero. Iun tagon ili aŭdis, ke grupo da malliberuloj forkuris de Ŝumen al Sovetunio. En la tri suferantaj koroj naskiĝis nova, pala espero. Eble Rosen estas kune kun la forkurintoj...

En ploroj, atendado kaj trompaj esperoj Minka naskis sian unuan infanon. Estis knabo. La trista familio donis al li la nomon de la malaperinta patro.

*

Post 25-jara militservo leŭtenanto Sotirov pensiigis antaŭ la Naŭa de Septembro* kiel kolonelo kaj transiris al la rezerva armeo. Li lamis per la dekstra kruro, sed ĉiam sentis sin feliĉa homo. Li havis familion, aparta-

* La Naŭa de Septembro 1944 j. — tago de liberigo de la bulgara popolo el la faŝismo-pere de ribelo kaj de la decida helpo de la Ruĝa Armeeo de USSR.

menton en Sofio. En la kvartalo, kie li loĝis, oni estinis lin. Neniu sciis pri liaj krimoj en la pasinteco.

La ĉefserĝento Ivan Ĉernosmokov ĉiam restis nur serĝento. Ankaŭ li pensiigis sana kaj forta antaŭ la Naŭa de Septembro. Post la popola venko li adaptiĝis al la nova sociordo, sed konstante timis, ke iun tagon oni ekscios pri liaj krimoj en la kazerno. Ĉernosmokov vivis maltrankvile. Li malmamis Sotirov kaj evitis renkonti lin.

Iun tagon Ĉernosmokov ricevis invitilon de esplorjuĝisto de la milico kaj morte timigita diris al si mem:

— Tiu ĉi ruĝa papereto estas mia morta verdikto!

Li iris en la milicejon. La esplorjuĝisto estis juna kaj bela homo. Ho, tiel li similis al lia iama samvilaĝano-instruisto. Kaj la nomo — la sama: Rosen Ĵelezov. Ĉio estis klara.

La esplorjuĝisto invitis Ĉernosmokov sidigi.

— En via intereso estas paroli la veron — diris li.

— Jes, kamarado Ĵelezov.

— Kion vi scias pri la murdo, sinjoro Ĉernosmokov? Rakontu ĉion. La aliaj atestantoj diris multon.

Ĉernosmokov paliĝis. Li ekpensis, ke la esplorjuĝisto scias ĉion pri lia krimo en la kazerno.

— Kiu murdis lin? — ripetis severe la juna homo.

— Kamarado esplorjuĝisto, mi ne murdis vian patron. Kolonelo Sotirov, tiam leŭtenanto, murdis lin.

La esplorjuĝisto estis surprizita. Invitante Ĉernosmokov kiel atestanton lige kun alia krimo, neatendite li malkovris la murdiston de sia patro.

— Sinjoro Sotirov diris multon. Sed li kulpigis vin, — mensogis la esplorjuĝisto, ĉar Sotirov tute ne estis invitita en la milicejon, — tial vi rakontu ĉion! La tribunalo prijuĝos la kulpon.

Kaj Ĉernosmokov komencis. Li deziris ĵeti la kulpon pri ĉio pli grava sur la eksleŭtenanton Sotirov.

— Post la pogromo de la ribelo la registaro de Cankov ordonis, ke ni serĉu komunistojn kaj agrarpartistojn kaj arestu ilin. La armeo kaj la polico agis kune. Laŭ ordono de la regimenta stabo mi kaj leŭtenanto Sotirov kun grupo da soldatoj iris en mian vilaĝon kaj arestis 48 homojn. Inter ili ankaŭ vian patron. Oni akuzis lin kiel kurieron inter la partizanoj kaj iliaj helpantoj. Ankaŭ pro tio, ke li transformis la esperantistan societon en propagandejon de komunismo. Ni ŝlisis la arestitojn en malvasta kelo de la kazerno kaj lasis ilin sen manĝaĵo kaj akvo. Tiel ili restis du tagojn. La trian tagon leŭtenanto Sotirov ordonis, ke ili eliru. Al la malsataj arestitoj oni donis manĝi salajn fiŝojn kaj tre salan panon. Ili manĝis. Post duonhoron tamen ekturmentis ilin tia soifo, ke ili komencis petegi akvon. Antaŭ la soifantoj oni metis akvoplenajn botelojn. Laŭ la ordono de la leŭtenanto mi iris al ĉiu arestito kun plena botelo, tuŝis lian buŝon per ĝi kaj demetis ĝin. La leŭtenanto ridegis pro plezuro rigardante tiun scenon. Kiam mi ekstaris antaŭ la arestita Maria Parova, ŝi komencis plori kiel infano kaj laŭte peti guton da akvo. Ŝi tiel kortuŝe petegis, ke via patro ne eltenis: li kaptis la botelon el mia mano kaj donis ĝin al Maria. Ŝi eltrinkis preskaŭ la tutan akvon.

— Kaj kion faris Sotirov al mia patro?

— La leŭtenanto ordonis, ke oni enigu lignerojn sub la ungojn de lia dekstra mano.

— Ĉu mia patro ne kontraŭstaris?

— Jes, li kontraŭstaris, sed kvar fortikaj soldatoj tenis lin. Oni enigadis la lignerojn, via patro kriegis pro doloro, larmis, sed oni devis plenumi la ordonon de la estro. Kaj la estro ridegis pro plezuro kiel diablo. „Faŝistaj bestoj, venos la tago, kiam vi respondos pro viaj krimoj!“ — kriegis via patro. Pro liaj krioj tremis la tuta kazerno. La ceteraj arestitoj rigardis



teruritaj. La junulino Maria svenis.
„Skurĝu ŝin por rekonsciiĝi!“ — or-
donis Sotirov...

— Ĉu oni batis ŝin? — demandis
la esplorjuĝisto.

— Jes, mi skurĝis ŝin.

— Besto! Kial vi faris tion!?

— Mi devis plenumi la ordonon de
miaestro. Kazerna disciplino, sinjoro
esplorjuĝisto. Poste: mi volis vivi.

— Vivo de ekzekutisto! — indignis la
esplorjuĝisto.

— Kaj tamen vivo.

— Rakontu plue.

— Rigardante tiujn scenojn iuj are-
stitoj komencis peti: „Ne torturu nin!
Ni diros ĉion, pri kio vi demandos!“

Ĉernosmokov ĉesis paroli kaj ĝem-
spiris.

— Ĉu vi donos al mi glason da
akvo, sinjoro esplorjuĝisto? Mi lacigis.

— Bonvolu!

Ĉernosmokov trinkis soife. Ŝvito
fluis sur lia vizaĝo. Li suferis, kvankam
li estis murdisto. Li estis homo.

— Plue? — demandis la esplor-
juĝisto.

— Ĉe la pridemando iuj diris mul-
ton, ĉar ili volis vivi. Aliaj diris nenion.
Kiuj ne volis paroli, estis trenataj per
ŝnuroj ĉirkaŭkole tra la koridoroj kaj
la ŝtuparoj ĝis la kelo. Iuj sufokiĝis,
al aliaj rompiĝis la kranioj. Iuj mortis.
Inter ili estis ankaŭ la esperantistino
Maria.

— Kaj mia patro?

— Li diris nenion. Tiam mi skurĝis
lin laŭ la ordono de la leŭtenanto. Via
patro svenis. Ni surverŝis lin per akvo.
Li rekonsciiĝis, sed malgraŭ la suferoj
nenion diris. Tiam la leŭtenanto, ko-
lerigita kaj mirigita pro lia firmeco,
frapegis per la tenilo de sia revolvero
lian buŝon kaj rompis liajn dentojn.
Sango ekfluis.

Vivaj kaj mortaj estis kune en la
kelo. La vivaj sufokiĝis pro manko de
aero kaj pro malbonodoro. Ili ĝemis,
petegis panon kaj akvon. Tiu kazerna
kelo estis vera infero.

*Ribelintoj el Suda Bulgario kondamnitaj
je morto.*



La kvinan tagon post tio venis or-
dono, ke ĉiuj arestitoj estu liberigitaj.

Tiam pro timo, ke la popolo kaj la
ekstera mondo ekscios pri la krimoj
en la kazerno, la leŭtenanto decidis
mortigi ĉiujn arestitojn. Li ordonis al
ili supreniri sur la mallargan terason
en la dua etaĝo, alta kvin aŭ ses me-
trojn, kaj de tie propramane puŝis ilin
teren. Malsupre aŭdiĝis ĝemoj kaj veoj
de la falintoj. Sed li ridis abomene.
Mi estis ĉe la teraso kaj indignis en
mi, sed nenion mi povis fari.

Kiam venis la vico de via patro —
li estis la lasta, — la leŭtenanto kare-
sis per mano lian vizaĝon, sangumis
siajn manojn kaj diris moke: „Mi flaros
vian sangon por vidi, kian odoron
havas la komunista sango.“ Kaj li flaris
siajn sangmakulitajn manojn.

En la sama momento via patro, mal-
graŭ treege turmentita kaj kun ligitaj
manoj dorso, kurbiĝis streĉe al la
leŭtenanto kaj puŝis lin per ŝultro. Ili
ambaŭ falis teren. La sadisto kriegis
pro doloro. Liaj du gamboj rompiĝis
kaj lia krimula kapo kontuziĝis. Sed
li restis viva kaj lamas ĝis nun.

— Post tio kio okazis?

— Post tio mi ordonis al du solda-
toj enporti la mortintajn kaj la vivajn
arestitojn en la kelon. Sed vidinte, ke
via patro spiras, mi apartigis lin en
unu angulo.

— Kial vi apartigis lin?

— Ĉar mi metis multe da neestin-
gita kalko sur la amason da kadavroj
kaj surverŝis ĝin per akvo. Mi eksen-
tis kompaton al via patro, ĉar vere li
estis tre bona homo. Li instruis la in-
fanojn, helpis al ĉiuj, kiuj turnis sin
al li. Krom tio ni estis samvilaĝanoj.
Kiel infanoj ni ludis kune. Antaŭ ol



PARTIZANINO

bulgara popolkanto

Haltigis panjo filinon,
haltigis ŝin kaj demandis:
— Kien vi iras, Dragana,
kun ĉi pafilo en mano?
Kial ne restas, Dragana,
ĉe viaj samaĝulinoj?
Al panjo diras Dragana:
— Lasu min, panjo, lasu min!
Sur la Balkanon mi iros,
partizanino fariĝos.
Tie kun fraĉjo Stojano,
ni por justeco batalos,
justeco kaj libereco!

El la bulgara: Zafira Dimitrova

*III premio de la Jubilea Literatura
Konkurso*

IMPULSO

de Nikolaj Zidarov

Tra la vivo, kie hurlis ventoj,
klar-okule devas iri ni,
por ke reviviĝu niaj sentoj,
estingita strebo, emoci'.
Ja ne gravas, ke fojfoje revas,
vagas, serĉas vaston nia kor' —
oni multe bataladi devas,
por ke fruktu la printempa flor',

Ricevinte de la fulm' fajrerojn,
firman kredon el la homrigard',
eternigu en poem' sincera
viajn pensojn kun poeta ard'.
Por ke oni diru: li repagis
sian gloron per junec' kaj sang';
li suferis, luktis — kaj li mortis,
por ke vivo floru en la land'.

El la bulgara: Tempesto

verŝi akvon sur la kalkon, mi metis
apud vian patron kruĉon da akvo, tri
panojn kaj alumetujon.

— Poste?

— Poste laŭ ordono de la leŭtenanto
mi dike masonis la pordon kaj la fe-
nestron de la kelo.

— Vi masonis ilin vivaj!? — ekkriis
paliĝinta la esplorjuĝisto.

— Jes, vivaj. Tiel oni ordonis. Mi
ankaŭ volis vivi! Mi diris al vi ĉion,
sinjoro esplorjuĝisto! Mi jam ĉion
diris.

Kaj la ekzekutisto komencis plori.
Kelkajn tagojn post la konfeso la

HELA KREDO

de Dimčo Debeljanov

Al mond' malnova venas lasta tag' —
kateno post kateno disrompiĝas,
kaj super ĝia ruiniga plag'
altaro de l'justeco jam leviĝas.

Mallum' netravidebla kuras for,
heligas sun' dormeman firmamenton,
eksvingas siajn flagojn kun fervor'
sennombraj batalantaj regimentoj.

Radi' matena brilas en rigard' —
nenia tim' pro luktoj antaŭstaraj,
ĉar kontraŭ ties kunigita ard'
pereas juko kaj dolor' amaraj.

Serĉitan vojon ili trovis nun,
kaj vidas ili bordojn purpur-orajn...
Ho, hela kred' je nova vivo-jun',
varmigu kaj altigu vi la korojn.

El la bulgara: Canko Murgin

Kiu almlitis fortikaĵon,
varmon donis al malvarma ŝton',
scias bone, ke la vivfloradon
pereigas nek mort', nek malbon'.
Tial homo kun sofo iras,
tial ŝvelas fruktoj en la bed' —
ĉar post ĉiu morto renaskiĝas
alta kor-impulso, hela kred'...

masonita pordo de la kazerna kelo
estis detruita. Pli ol dudek jarojn ĝi
konservis sian sangan sekreton en
mallumo. Nun la esploraj ŝtatorganoj
trovis la amason de homaj kadavroj,
kovritaj per estingiĝinta kalko. Ek-
ŝvebis venena malbonodoro. Flanke de
la amaso kuŝis skeleto. Apud ĝi estis
renversita kruĉo.

La restaĵoj de la mortigitoj estis
transportitaj kaj solene enterigitaj en
ilia vilaĝo.

La rezerva kolonelo Sotirov kaj la
iama ĉefserĝento Ĉernosmokov estis
alvokitaj al la Popola Tribunalo.



En Vrabevo, florplena kaj truktodona vilaĝo en la regiono de Trojan, mi aŭdis interesan legendon pri tio, kial la altaĵo apud la vilaĝo estas nomata „Gjaur-bair“.

Gloriĝis Vrabevo per siaj laboremaj vilaĝanoj kaj belaj virinoj. Belaj estis la virinoj de Vrabevo, sed la plej bela el ĉiuj estis fraŭlino Todora. Ne hazarde la maljunaj turkoj sidantaj antaŭ siaj pordegoj kun pipoj en la buŝoj okulaĉis kaj parolis:

— Maŝalla, maŝalla! Ĉok ĝjuzel kâzâm!¹

Ĉu por akvo al la fontano ŝi iris, ĉu sur kampo ŝafaron ŝi paŝtis — bela Todora ĉie admiron vekis. La junaj lasis sian laboron kaj sopiris pri ŝi. La maljunaj balancis kapojn kaj parolis profete:

— Ne signas bonon tiu beleco, ne signas. . .

Ĉiu fraŭlino havis amanton, Todora belulino ankaŭ havis. Plej elstaraj fraŭloj proponis al ŝi manon, sed ŝi amis nur sveltulon Nikola. Ĉar estis Nikola majstro-masonisto, ĉar estis li kaj laborema kaj bonkora. Kaj forta estis Nikola: se li ŝtonon premus — akvo ekgutos. Kies virina koro eltenas antaŭ vira forto?

Sed de kie venis Ŝukri-agao², altranga kaj malica homo? Ekŝatis li Todora-n kaj decidis fari ŝin turkino. Decidis li kaj ordonis: aŭ Todora turkino estiĝos, aŭ Nikola adiaŭos kun sia arda kapo.

Tamen Todora estis kaj bela kaj saĝa. Kredis ŝi en la fortaj manoj de sia amato kaj ruze respondis:

— Kiu forportos min enmane sur tiun monteton, al li mi apartenos!

Sveltulo Nikola kaj Ŝukri-agao faris veton: se la turko forportos la belulino sur la pinton, ŝi estiĝos turkino, kaj la kapon de Nikola li forprenos por festi sian venkon; se la bulgaro gajnos la veton, li prenu libere sian

amatinon.

Sed Ŝukri-agao ne sukcesis forporti Todora-n. Multfoje li ŝvitis, multfoje falis kaj leviĝis, sed ne atingis la celon kaj malgajnis la veton. Li revenis hontita el la mezo de l'monteto.

La sekvan tagon venis la vico de Nikola. La amo donis al li flugilojn, kaj la penso, ke li defendas la honoron de la bulgaroj, inspiris lin. Li prenis la fraŭlinon kiel lanugon, ekportis ŝin supren al la pinto. Kaj turkoj kaj bulgaroj rigarde sekvis la duopon kaj admiris Nikola-n. Tian bravulon ili ne estis vidintaj.

— Vaj, vaj, vaj³, — miregis iuj turkoj

— Erbap ĉoĝuk⁴! — diris aliaj.

— Aŝkolsun, aŝkolsun!⁵ — aprobe aldonis maljunuloj.

Haltis Nikola sur la pinto kun la kara ŝarĝo enmane. Haltis li kaj daŭre kisis sian koramatinon. Eĉ la birdoj eksilentis por ne konfuzi ilin. Eĉ la suno haltetis en la ĉielo por ĝoji al la feliĉo de la geamantoj. . .

Tamen tiumomente haltis ankaŭ la spiro de Nikola. Io ŝiriĝis en lia brusto, kaj lia koro ĉesis pulsii. . .

Post tiu malfeliĉa fino Todora metis nigran tukon surkapen kaj tutan vivon ne demetis ĝin. Funebrante ŝi restis fidela al sia unua amo.

Kaj ĉar la bulgaro — la „gjauro“⁶, kiel nomis lin la turkoj — gajnis la veton, la loĝantaro de la floranta Vrabevo nomis la altaĵon „Gjaur—Bair“⁷ — simbolo de la honoro kaj forto de la bulgaro.

¹ Brave, brave! Tre bela knabino!

² Sinjoro, rangulo (Honortitolo ĉe turkoj)

³ Turka ekkrio: aj! ho!

⁴ Kapabla knabo, he! (tur.)

⁵ Brave, brave! (tur.)

⁶ „Gjaur“ (tur.) — persono, kiu ne apartenas al la islamo; tiel la turkoj nomis la alireligianojn, do ankaŭ la bulgarojn.

⁷ Bair — altaĵo, monteto (tur.).

— Kvazaŭ malsupre estas senfunda abismo — mi diris al la apude sidanta grandaĝa viro kun griza hararo kaj esprimplena vizaĝo.

Li estis armeno el Varna kaj ni amikiĝis en la ripozdomo. Travivinte kiel infano la terurojn de la turkaj masakroj en sia patrolando, li restis orfo kaj kun aliaj fuĝintoj venis al Bulgario. Kiel junulo li studis en Francio kaj konkeris la koron de riĉa francino. La junulino estis filino de la posedanto de l'fabriko, kie la armeno laboris. Sed mia amiko estis tre fiera por ŝuldi sian feliĉon al virino, revenis al sia amata Bulgario kaj perlaboris sian panon kiel dokisto en la haveno de Varna. Nun li estas pensiulo, skribas en la ripozdomo longajn franclingvajn leterojn al siaj parencoj en Francio. Dum la amuzvesperoj neniu alia dancas tiel vigle kaj gracie kiel li. . .

Malrapide la busoj supreniris la mallarĝan asfaltitan vojon serpentumantan per grandaj danĝeraj kurbiĝoj, kiujn la konstruistoj kvazaŭ estis forgesintaj fortikigi. La pluveto faris la asfaltan glita. Densa nebulo malhelpis min orientiĝi pri la spaco ĉirkaŭe kaj plifortigis la senton, ke ekster la vojo estas nur senfunda abismo.

Ekpensante pri ebla akcidento, mia rigardo nevole direktiĝis al la ŝoforo. Li estis juna sunbrunigita viro. Trankvile kaj memfide li tenis la direktilon, kaj al mi ŝajnis, ke li kondukas nin rekte al la ĉielo. . . „Kun kondukanto kiel la nia mi estas preta por tia vojaĝo“ — mi diris al mi mem ridetante.

Baldaŭ la buso jam haltis kaj la ekskursantoj elbusiĝis. Mi mordetis malkontente la lipojn. Antaŭ ni staris nova konstruaĵo — hotelo „Beklemeto“. „Kial mi venis ĉi tien? — mi riproĉis min. Kial mi ne restis en la ripozdomo, en la hejmeca ĉambro kun interesa libro enmane? Tiom longa vojo, kaj finfine —

ordinara konstruaĵo, nebulo kaj nenio pli!“

Mi eniris la restoracion kaj eliris ankoraŭ pli seniluziiginta.

Komencis pluvi. Miaj kunveturantoj estis ĉirkaŭirintaj nian ekskursgvidistion. Multaj el ili estis malfermintaj siajn ombrelojn. Mi proksimiĝis kaj aŭdis ion el la parolo de la juna virino. Ŝi diris, ke ni devas vidi nepre rimarkindan fagon, vivan monumenton el la Liberiga Milito de antaŭ unu jarcento.

— Ĉu ĝi troviĝas malproksime?

— Ne pli ol duonhoron.

Kaj malgraŭ la pluvo ni ekpaŝis sur la monta vojo kovrita de pluvmarĉetoj. Ni preterpasis belegan grandan vilaon, pri kiu la gvidistino diris, ke ĝi apartenas al la loka agrikultura kooperativo. Krom ĝi en la arbaro estis aliaj koke-taj montodomoj. Ĉiuj formis la turistan urbeton „Beklemeto“. Sur la teraso de nefinkonstruita domo staris kelkaj konstrulaboristoj vestitaj en kotonjakoj. Pro la malbona vetero ili ne laboris. Unu el ili ĝoje ekkriis:

— Ha! . . . Tiuj ĉi estas el la ripozdomo! . . . Kia malbonŝanco por ili!

Ni hontigite paŝis plue kaj post kelke da minutoj atingis la celon de nia ekskurso. Maljuna fago staris etendante siajn potencajn branĉojn. Malsupre ĝia dika arĝentgriza trunko estis kovrita de mola verda musko. La foliaro estis jam orumita de l'aŭtuno. Mi voĉe legis la skribaĵon sur la ligna tabuleto fiksita al la arbo. La ruĝaj literoj parolis, ke en la neĝaj januaraj tagoj de 1878 jaro ĉi tie pasis la liberigaj trupoj de la rusa generalo Karcev. Kiel memoraĵo pri tio restis granda vertikala cikatro sur la ŝelo de la arbo.

Ĉu brava rusa soldato batalante kontraŭ la malamiko nevole fendis ĝin per sia sabro? Aŭ li intence faris tion, por ke la posteuloj memoru lin? . . .

La fago mistere silentis.

EXEGI MONUMENTUM¹

de A. S. Puŝkin

Al mi konstruis mi spiritan monumenton,
al ĝi vojeto kovros sin per herb' neniam;
ĝi levis sin pli alte en la firmamenton
ol Aleksandra obelisko nia².

Mi ne pereos tute — kara lir' anima
postvivos cindron mian, al la mort' rezistos;
triumfos mi eĉ kiam sur la ter' senlima
poeto unu nur ekzistos.

Pri mi kurados fam' tra rusa land' sen fino,
en ĉiuj ĝiaj lingvoj oni min mencias —
fiera slava nep', tunguz' sovaĝa, finno,
kalmuk', amiko de la step', pri mi ekscios.

Kaj longe amos min popol' de l'rusa tero,
ĉar mi kantante vekis sentojn bonajn, indajn,
ĉar en jarcent' de jug' mi kantis pri libero,
indulgon petis por falintaj.

Obeu, muzo, la ordonojn diajn,
ne timu la ofendojn, ne postulu kronon,
malŝatu laŭdojn, spitu vortojn kalumniajn,
al malsaĝuloj ne oponu!

El la rusa: Simeon M. Simeonov

¹ Mi konstruis monumenton.

² Alta kolono en Peterburgo, konstruita en 1834 j. honore al la venko de Aleksandro I super Napoleono.

Sed mi vidis lin en mia imago, tiun
bravulon, venintan el la vastega rusa
lando. Li estis juna, svelta, ridetanta,
bonkora, sed terura kontraŭ nia kvinjar-
centa turko-subpremanto. Mi vidis lin
reveninta en sian vilaĝon post la san-
goverŝa milito kisi sian fianĉinon. Sed
mi vidis lin ankaŭ mortanta sur nia
tero kiel miloj kaj miloj da aliaj. . .

Fera barilo ĉirkaŭas la fagon. Iu
estis metinta kronon el pinaj branĉetoj
jam duone sekiĝintaj. Proksime de ĝi
staris ankoraŭ kelkaj aliaj fagoj. Sur
ĉiu el ili estis kroĉita tabuleto kun sur-
skribo „Multjara arbo“. Ili estis vivaj
atestantoj pri tiu memorinda tago, kiam
la nekonata soldato el la frata slava
lando vundis per sia sabro ilian junan
fraton. Kaj nun ili kiel honora gardan-
taro staras ĉirkaŭe, rekonante ĝian su-
perecon.

Milde mi karesis la muskokovritan
ŝelon de la cikatriĝinta arbo. Mi estis
kontenta, ke mi, kiu ĝis nun sciis ne-

ĈE LENIN ESTIS MI

de Orlin Orlinov

Pri nia viv' ni sentas malkontenton!
Post la konstruo de l'apartamento
ni trovas la tapiŝon eluzita
kaj pens' pri nova premas la spiriton.
Al ni la vivo ŝajnas malkonformi.
Ĉe Lenin tamen estis mi, en Smolni:
seĝ', ligna seĝo, vestoŝrank' domaĝa,
skribtablo, kiun eĉ sekretari' vilaĝa
ne volus havi en la kabineto —
(ni ne parolu do pri la poeto);
hotela lito el provinc-profundo —
oaz' trankvila por genia frunto;
inkujo kaj plumingo simpla, flava
— ĉu unu penson aŭ dekreton gravan
enskribis, donis ĝi al la homaro. . .

Ho, kiel simplas la grandegaj faroj!
Ĉe Lenin estis mi. Modestaj du ĉambretoj.
Sed lin respektas ne nur la proletoj.
Ho, nia vant' nesatigebla, straba!
Vi donas ĉion, sed la mondon de ni rabas. . .

El la bulgara: Stefan Kiraĝiev

*II premio de la Jubilea Literatura
Konkurso*

nion pri ĝi, estas jam unu el la mul-
taj miloj da homoj, kiuj vidis tiun ĉi
unikan kaj vivan monumenton de la li-
beriga milito. Poste mi rapidis atingi
la aliajn ekskursantojn. En la restora-
cio ni tagmanĝis. Ripozinte kaj varmi-
ĝinte ni enbusiĝis.

Malrapide kaj singarde la du busoj
komencis malsupreniri sur la malseka
asfalto. Sed nun la naturo kompatis
nin, kaj ĝia potenca mano disŝiris la
nebulon. La imagita senfunda abismo
malaperis. Vere la deklivoj de la mon-
taro estis krutaj, sed nun mi rigardis
sur ili freŝajn verdajn herbejojn kun
fojnostakoj kaj sin paŝantaj ŝafaroj,
arbarojn kun bunta foliaro.

Flue kaj agrable malsupreniĝis nin
la busoj al la ruĝaj tegmentoj de la
domoj de iu vilaĝo en la valo.

— Nun mia animo estas plena de
impresoj,—mi diris al mia armena amiko.

La vetero estis malbona, sed la ek-
skurso — belega.

de Robert Rojdestvenskij

Pediko
herba
rampas jen
nur supren
sur la tig'. . .
Vi kial vivas,
homo,
mem
simila al pedik' ?

Imagu :
la atoma
nub'
vastiĝas,
vibras ĝi.
Jam dezertiĝis
tuta Ter',
sed vivas
sole vi.
Sukcesa,
kvazaŭ vera car',
trankvila,
sen sufer',
saviĝis vi
de la koŝmar'
tutsola
sur la Ter'.
Sur sablo, sur glacia plat',
starante aŭ sur voj',
solecas vi en dormo, frat',
solecas
en malĝoj'.
Sur tiu bela Ter' —
planed',
taŭzita
sen kompat' —
nek leĝoj
estos,
nek konat',
nek
iu nekonat'.
Nenie estos
sur la Ter'
eĉ ajna ekzistad' :

nek iu hundo,
nek paser',
nek eĉ
mizera kat'.

La viv' pereis
ĝis la fin'.

Raŭkante
pro trablov'
metrò atendas
sola vin,
sen homoj
kaj sen mov'.

Neripetebla
tiu mond'
jam restos
por estont',
kaj iros,
kantos
sola vi
kaj songos
sola vi.
Vi estos sola
por la mond'
dum pluv', varmego, neĝ' —
por la senlima
mara ond',
por ŝipoj

sen sirena son',
por nezumanta telefon'
(sen malamiko eĉ).

Vi estos sola
por jarcent'. . .
„Ho, ne-e!!!
Ne volas mi! . . .“
Sed kial nun
kriado,
plend' ?

Hieraŭ
mutis vi.

El la rusa: Klara Rabinoviĉ
II premio de la Jubilea Literatura
Konkurso

AŬTUNO ESTAS

de Miĥail Ĥekerĝiev

Ekzistas iu tenereco en la aŭtuno.
Buntaj koloroj kovras la korpon de la
montaro, kaj la arbaro brulas en incen-
dioj. Flavaj arbofolioj surteriĝas malra-
pide kvazaŭ per paraŝutoj kaj susuras
sub viaj paŝoj. Iu mola silento karesas vin
kaj igas vin mediti. Tiam miloj da pensoj

trapasas vian konscion — pensoj pri la
vivo, pri la juneco, pri la maljuneco.
Kial ĉio en la mondo estas tiel efe-
mera? Estas klare: iun tagon ankaŭ
vi samkiel aŭtuna folio deŝiriĝos de la
homa arbo kaj forpasos en la malekzi-
ston. Tiam via koro, seninterrompe ba-



tinta ekde via naskiĝo, ĉesos bati, kaj viaj sentoj, donintaj al vi tiom da emocioj, ĉesos funkcii. Ĉar la vivo estas ĝojo kaj sufero, tago kaj nokto, printempo kaj aŭtuno.

Vidu kiel la arbofolioj ŝrumpas, vidu kiel la haŭto de la maljunuloj estiĝis maldika, seka kaj flavbruna, similanta antikvan papiruson, sur kiu estas skribita la saĝeco de la vivo.

Mi alproksimigas mian avon, kiu sidas en nia malgranda ĝardeno kaj apogas sian kapon sur bastono, rigardante silente la teron.

— Pri kio vi pensas, avo? — mi demandas lin.

— Mi nombras miajn malĝojojn kaj suferojn kaj aldonas al ili miajn ĝojojn kaj feliĉon, — respondas la maljunulo.

Poste, metinte manon sur sian koron kaj sen rigardi min, parolas plu:

— Memoru, filo mia: strebu havi grandan animon kaj ami la homojn. Sen tio iun tagon vin englutos ne nur la tero, sed ankaŭ la forgeso, kaj neniu rememoros pri vi.

Aŭtuno estas. Iufoje pluvas. La gutoj frapas la fenestron, glitas sur la vitroj kaj malaperas. Ĉu ne tiel naskiĝis kaj malaperis dum mia vivo miaj revoj kaj deziroj?

Sed jen, la pluvo ĉesas. Mi rapidas

eliri eksteren por spiri la refreŝigitan aeron. En la parko la pluvo kotigis la vojeton kaj la koto malpurigis miajn ŝuojn, mian pantalonon. Ho, tiu ĉi koto, sinonimo de io malbona! Kiom da fojoj ankaŭ mi konscie aŭ nekonscie malpurigis per kotaj makuloj mian animon kaj la animojn de miaj proksimuloj! Kiom da fojoj mi ĉagrenis, ofendis, trompis ilin, sen peti pardonon! Ĉu mi efektive estas fiera, egoisma, ŝtonkora aŭ orgojla?

Kaj denove mi rememoras la vortojn de la maljunulo: strebu havi grandan animon kaj ami la homojn! . . .

Aŭtuno estas. La fruktoj maturiĝis, la abeloj plenigis la ĉelojn per dolĉa mielo, la sciuroj jam kolektis glanojn por la vintro. La naturo malavare elverŝis riĉaĵojn por ĉiuj.

Kaj vespere, enlitiĝinte, antaŭ ol ekdormi mi demandas min: kion mi kreis hodiaŭ, kion utilan mi faris hodiaŭ por la homoj, ĉu mi gajnis novajn geamikojn, aŭ pro iuj neprudentaj agoj oni ignoras aŭ jam forgesis min?

— Vi prenis, tamen ĉu vi pagis? — sonas en miaj oreloj la vortoj de nia poeto Javorov. Ni ĉiuj prenis, tamen ĉu ni donis ion adekvatan al la vivo?

Aŭtuno estas. Sezono de meditoj kaj rezonoj.

NOKTURNO

de Prodan Prodanov

Al NS dediĉe

Dum nokto maja rave bela
ni migris kune en montaro.
La luno ĉarma kaj fabela
lumigis vojon tra l'arbaro.

Dum nokto maja rave bela!

Memoru tiun nokton, kara!
Bloveton de l' facila vento,
susuron dolĉan foliaran
kaj steloplenan firmamenton!
Brilanta lun' arĝentopala,
radiis en okulojn viajn;
la kanto de la najtingalo
mildigis korojn kaj animojn.

Tiel dum tiu nokt' beata
ekfloris amosent' pasia.
Ho, mia bela kaj amata,
mi estis pro feliĉ' ebria!

Dum nokto maja, rave bela. . .

Memoru tiun nokton, kara!
Odoron de l'montaraj floroj,
la rosogutojn de l'herbaro,
la kunbatadon de la koroj!
Dormanta urbo en lontano
allogis nin per lumobriloj;
babilo gaja de l'fontano
resonis al la kant' de l'griloj!

Mi amas vin, patruja ter',
amika, frukta kaj feliĉa.
En mia kor' naskiĝis ver',
kaj sango mia pulsas riĉa.

Sur via brusto brilas flor'
belega kiel ĝojo suna,
ĝi disfloras per labor'
survoje al la celo luma.

El sango pura kaj esper'
naskiĝis la mateno klara,
kaj tra la koroj kiel ver'
trapasas vi, patrujo kara.

Popolo mia post ribel'
suferis sub faŝista premo,
sed luktis ĝi sub la ĉiel'
kuraĝe, firme, sen timtremo.

Neniam falu via flag'
sentima, glora, sen ekzemplo.
Ekbrilis via hela tag'—
la venka Naŭa de Septembro.

Forpasis jaroj de sufer',
tagiĝis super la Balkano.
Al ni alvenis la liber'
per helpo de la rusa mano.

II premio de la Jubilea Literatura Konkurso

ALLOGA LUMO

de Stojan Kostadinov

Ie fore Nigra Maro
kisas la ĉielon mem,
tie kun lumanta ĉaro
sun' aperas en maten'.

Banas sin la ruĝa suno
en vastega Nigra Mar',
kaj proksime sabla duno
brilas en matena ĉarm'.

Sian vojon suno iras,
alten marŝas en akord',
milde la silenton ŝiras
etaĵ ondoj ĉe la bord'.

Reflektiĝas suna lumo
super mara granda spac'.
Malproksime ŝipa fumo
sternas sin sur la surfac'.

Nia ŝipo nun veturas
rekte al la ruĝa sun'.
Ni impete venke kuras
al la komunisma lum'!

de Damjan Damjanov

Vi dormas jam? Mi venos noktomeze.
Pardonu min, ke mi nun vekis vin.
Ho mia kor'! La malgajec' freneze
en ĉirkaŭpreno forte premas ĝin.

Mi solas, sed paroli mi deziras,
la buŝo nun gluiĝas pro silent'.
Ne pelu min, ja baldaŭ mi foriros —
mi venis kun la voĉo de la vent'...

Mi tie ĉi, ĉe via kapo sidos,
fabelon de l'pasint' rakontos mi,
en kiu la edifon mi konfidos
de saĝa homo. Jen la histori'.

Bandito voje vagis tutan vivon
kaj ne revenis al la patra dom'.
Anstataŭ koro sub ĉemiz' tranĉilon
sekrete portis la malbona hom'.

Embuskis li dumnokte karavanojn
kaj kaŝis tage la ponardon li
kaj siajn sange makulitajn manojn...
Ol la diablo li malbonis pli.

Sed foje li ekdormis ripozante
ĉe vojkruciĝo, sub la suna ard'.
La homoj lin neglekte puŝis plande,
neniu lin honoris per rigard'.

Knabino nur, ĉifonvestita, garde
protektis lian kapon per foli'.
Neniam prizorgita, li nun arde
ekploris, jes, ekploris arde li.

Per kio do, varmiĝis kor' malmola,
neniam varmigita de amsent'?
Ho, igis ĝin knabina mano sola
ekverŝi larmojn sangajn pro la pent'.

La eta man', pli varma ol ardaĵo,
al la bandito donis tion ĉi,
ja kion li ne havus per rabaĵo,
nek per falinta kapo de l'tranĉil'.

... Vi dormas jam, kaj frostas koro mia.
Ho, kie estas tiu ĉi knabin'?
Varmigis ŝi banditon, tamen kial
ĝis nun neniam vi varmigis min?

El la bulgara: Marin Băcev

*Se via amiko aŭ konatone suk-
cesis aboni nian organon „Bulga-
ra Esperantisto“ per la poŝto, in-
stigu lin fari tion pere de la loka
Esperanto-societo. Tiu lasta sendu
grupe la abonojn al la Redakcio!*



GRAVA DEMANDO

— Kial vi ne lavas manojn
kaj vizaĝon antaŭ manĝo?

Voĉas panjo, kaj mi sentas,
ke forlasas min kuraĝo.

— Pereigu ĝin tertreme —
sapon, nudon sen postsigno!

Dume mi obeu panjon,
kiel decas — sen indigno.

Ambaŭ manojn mi sapumas,
nazon, buŝon, sen domaĝo.

Kiu diros, ĉu oreloj
apartenas al vizaĝo?



SEMAJNO

Semajno
havas tagojn sep.
Kvin tagojn —
al laboro.
La lastajn
uzu laŭ dezir',
laŭ plaĉo
kaj humoro.

FLAGETO

Laŭtas ĝoje la tamburo,
ni ĝin sekvas kun plezuro:
mi kaj mia amiketo —
bela ruĝa festflageto!

DILIGENTAJ MANOJ

Knaboj!
Kion ni faru por ne enui?
Eble dometon novan konstrui?
Okupo ne malinteresa.
Kio estas por ĝi necesa?
Stupo.
Martelo.
Najloj.
Fero.
Tabuloj el kverka arbo.
Farbo.
Mastiko.
Vitro.
Brikoj. . .
Sed ĉefe, junaj brigadanoj,
necesas diligentaj manoj!

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ sincere gratulas la elstaran litovan esperantistinon-poetinion Ljudmila Jevsejeva lige kun ŝia 60-jara jubileo kaj bondeziras al ŝi firman sanon kaj multan feliĉon! Ke ŝia talenta plumo daŭre plezurigu infanojn kaj plenaĝulojn kaj servu ĉiam tiel fidele la amikecon inter la popoloj, la pacon sur la tero!

Distroĵoj

Akurata gardisto

Nova gardisto ricevas ordonon de la ĉefo:

— Vi devas gardi la spacon de tie ĉi ĝis tiu ruĝa lumeto, kiun vi vidas tie!

La gardisto iris gardi. Post unu monato li revenis kaj diris:

— Mi venas por nova deĵorado, ĉar la malnova jam finiĝis: tiu ruĝa lumeto estis de kamiono, kiu veturis ĝis Tokio.

La kranioj

En la muzeo estas du homkranioj — granda kaj malgranda. La muzea gvidanto diras:

— Tio ĉi estas la kranio de Mozart, — kaj montras la grandan kranion.

Iu vizitanto demandas:

— Kaj kies estas la malgranda?

— Ankaŭ de Mozart, sed kiam li estis infano, — klarigis la gvidanto.

Jozef Chvosta, ĈSR

KRUCVORTENIGMO

1. Eposa poeziaĵo kun lirika formo (rad.). Bati la grenon por eligi la grajnojn.

2. Harmonia tutaĵo da ideoj, kunordigitaj laŭ certaj principoj (rad.) Tute malesti aŭ ne esti en sufiĉa kvanto laŭ la bezono (preterito).

3. Vulkana elsputo (rad.). Malŝate, moke

ridindigi iun (adverbo).

4. Tutaĵo de homoj loĝantaj en sama lando (adjektivo). Forlaso de unu aŭ kelkaj silaboj en la fino de la vorto (rad.).

5. Scienca aserto, kiun oni evidentigas per rezona pruvado (rad.). Natura feroksida ŝtono, havanta la kvalitojn altiri iujn metalojn, precipe fero (rad.).

6. Fina parto de verko, malo de prologo (rad.) Plej rapida kurmaniero de ĉevalo (adverbo).

7. Konservi ricevitaĵn perceptojn aŭ ideojn. Sciigo aŭ klarigo pri io ne ankoraŭ konata (rad.).

8. Barbhava homo (sen finaĵo). Du prepozicioj.

9. Voĉe esprimi al publiko tion, kion oni aŭdis, vidis, spertis ktp (rad.). Kruele turmenti akuziton por devigi lin al konfeso (rad.).

10. Estre esprimi al iu sian volon, ke li faru tion, kion vi volas. Fervorego, arda aspirado al iu celo.

11. Prepozicio, montranta la situacion de iu aŭ de io en aro da personoj aŭ objektoj. Rifuzi obeon al aŭtoritato (adverbo).

12. Io farita el juto (sen finaĵo). Tio, kion oni sarkis (sen finaĵo, inverse).

13. Ringforma insulo,

1923																												
★	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	★	11	12	13	14	15	16	★	17	18	19	20	21	22	23	24	25	★
1												11	12	13	14	15	16											26
D M I A M G I L T I R J O ★ V B ★ O K J O C L I A N																												
★ II																												
III	27	28	29	30	31	32	33	34	35	36	★	38	39	40	41	42	★	44	45	46	47	48	49	50	51	★		
											37						43										52	
R O O V V C ★ I P ★ O S P A A R N A D N R B E E J J																												
★																												
IV																												



formita de koraloj. Parto de la ĉielo, en kiu la suno ŝajnas leviĝi.

14. Ĝi brilas matene sur la herbo. Perdo de la vivo.

15. Muzika tono malproksima de aliaj je ok gradoj (rad.) Superi malamikon (prezenco).

16. Riverego fluanta tra aŭ preter ok landoj (rad.). Bonodora rezino de diversaj vegetaĵoj (rad.).

17. Eksplosa metala globo. Konscia pri siaj meritoj.

18. Vegetaĵo, kies folioj pikas dolore. Cilindroformaj kuglegoj, plenigitaj de eksplodaĵo, kiujn oni elpafas per kanono.

19. Legomo uzata kiel salato (rad.). El ĝi oni teksas tolsimilan ŝtofon.

20. Brutaroj. Alligi beston al veturilo por tiri.

21. Matenruĝo. Kontraŭpluva aŭ kontraŭsuna ŝirmilo portebla (rad.).

22. Malmilde mallaŭdi iun kun celo plibonigi lian konduton (rad.). Difektita, eluzita peco da teksaĵo, da vesto (adjektivo).

23. Speco de tetrao (rad.). Tiu, kiu loĝas ie (sen finaĵo).

24. Krii, elmontrante bruan ĝojon. Trudi al iu cedeman respekton, admiron pro sia supereco (adverbo).

25. Okulkavo (adjektivo). Fari kontrakton por kompensi per mono okazebajn riskojn (rad.).

26. Fondinto de Sovetunio. Kunaĵo de ĉio, kio ekzistas en la mondo.

27. Prepozicio montranta, ke iu objekto staras malinterne de alia objekto. Energio ekbatali kontraŭ io aŭ iu (imperativo).

28. Muzikverko por instrumentoj. Deveno (rad.).

29. Aŭtomobilo, luebla de la publiko. Aldoni al tuto plibeligajn detalojn (imperativo).

30. Rigardi ion kun daŭra atento (rad.). Havanta ian konsiderindan meriton, kvaliton aŭ prezon.

31. Ordinara tripieda ilo, uzata por subteni aparaton aŭ instrumenton (rad.). Ĉiu el la apartaj bonaj inklinoj de la animo.

32. Lertigi per praktiko (rad.). La cifero 108.

33. Muzika komponaĵo por du voĉoj aŭ instrumentoj. Konstruo ebliganta traŭron de rivero, fosaĵo ks.

34. Matematika egalaĵo enhavanta almenaŭ unu nekonatan nombron (rad.).

35. Naskintino (inverse, sen finaĵo). Luksa planko el poluritaj lignaj tabuletoj (rad.).

36. Honora signo, kiun oni donas pro militaj aŭ civitanaj meritoj (rad.). Blua koloro de la ĉielo (rad.).

37. Duonronda rikoltilo. Parto de la fiziko koncernanta la lumajn femomenojn (adjektivo).

38. Nedaŭra ŝajna malapero de astro (rad.). Suferi pro bedaŭro kaj redeziro al io perdita (imperativo).

39. Riĉa kaj despota nobelo aŭ altrangulo (rad.). Du interjekcioj.

40. Ĉion ampleksanta. Karakterizas puton profunde boritan, el kiu akvo elŝpruĉas de si mem.

41. Mistera, neklarigebla per eksperimento kaj pozitivaj sciencoj. Forta ventego (adjektivo, inverse!).

42. Sumo periode pagata por servado, laboro, ofico (rad.). Rebonigi difektitan objekton.

43. Parto de la tago (rad.). Pluvoporta griza nubo (rad.).

44. Franca arkitektura stilo de la 12—15 jarcentoj. Solena eklezia malbeno (rad.).

45. Planko altigita super la grundo, kie artistoj plenumas programon antaŭ publiko (rad.). Definitive fiksi post pripenso opinion, juĝon aŭ volon (adjektivo).

46. Firme restanta ĉe sia propra opinio aŭ volo, malgraŭ ĉiaj kontraŭaj admonoj (rad.). En ĝi birdoj demetas siajn ovojn kaj kovas la idojn.

47. Malmola polurebla kalkoŝtono uzata en konstruado kaj skulptarto (rad.). Ĉefo de universitato (rad.).

48. Voĉdoni pri kandidato (inverse!). Stato de viro havanta samtempe du edzinojn (rad.).

49. Ne submetita al fremda volo (adverbo). Ege bela (adverbo, inverse!).

50. Havanta nek komenciĝon, nek finon (abverbo). Kredi, ke tio, kion oni deziras, realiĝos (adverbo).

51. Eksteraj difektoj de organismo, kaŭzitaj de frapoj. Ilo por alligi beston al tirotita objekto (sen finaĵo).

52. Kutima konduto de iu popolo aŭ persono (pluralo). Juna homo (sen finaĵo).

(Sekvas sur la kovrilpaĝo)

Redakta Komitato : Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Marin BÂCEV, Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV, Stefka ĤRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Al s-ro P. Atanasov,
Breznik, Bulgario

Kara amiko,

Koran dankon pro via ŝatata letero. Mi tre dankas vin ankaŭ pro la vevuo „Bulgara Esperantisto“ kaj pro la broŝuro „Bulgario“. Ĉio venis bonŝtate kaj multe plaĉis al mi. Interesplenaj estis la artikoloj de „Bulgara Esperantisto“ kaj belega la broŝuro. La enketan folion mi sendis per tiu sama poŝto.

Tutkore mi gratulas vin kaj viajn samlandanojn lige kun la anonco de la Ministerio por Edukado, kiu ordonis, ke ekde septembro de la lernojaro 1973/1974 viaj gelernantoj ricevu senpage lernolibrojn kaj kajerojn.

Kara amiko, en Usono kaj en aliaj kapita-

Maracay, 3. VI. 1973

listaj landoj la samo ne okazas. Usono disdonas senpage nur bombojn al Vjetnamio, Kamboĝo ktp. Tiel estas; la usonaj imperiistoj senpage disdonas morton! Al via laborema popolo mi bondeziras feliĉan vivon, pacon, novajn sukcesojn en la socialisma konstruado.

Nu, kara amiko, mi finas por hodiaŭ. Bonvolu akcepti, vi kaj viaj ŝatataj familianoj, plej sincerajn salutojn kaj bondezirojn de via ĉiama amiko kaj samideano en tiu ĉi fora lando.

Plej altestime kaj amike via,

J. Espinoza

FORPISIS VLADIMIR LAZAROV ĤRISTOV

La 8-an de majo ĉ. j. forpasis en Sofio la unua pioniro de la E-movado en la distrikto de Vidin Vladimir Lazarov Ĥristov.

Lazarov naskiĝis en 1894. Esperantisto li fariĝis en 1913 estante lernanto en la gimnazio de Peŝtera. Reveninte en Vidin, kie loĝis lia familio, li ekgvidis E-kurson kaj fondis la unuan lernejan E-grupon en Bulgario. Post la Unua Mondmilito li fondis ankaŭ la unuan E-societon en Vidin—„Espero“ kaj estis ĝia longjara prezidanto (1921—1934). Samtempe li ĉiam gvidis E-kursojn. Jam post 4—5 jaroj la societo nombris 70—80 membrojn.

Vladimir Lazarov estis la unua regula, pagata lektoro de Esperanto el la knaba gimnazio de Vidin enoficigita laŭ la ordono de Ministerio de Popola Instruado (1922/23 j.).

En 1929 li estis la prezidanto de LKK de la 16-a nacia E-kongreso. Laŭ profesio Lazarov estis juristo. Post la Dua Mondmilito li translokiĝis en Sofion, kie li emeritiĝis, kaj ekvivis en v. Simeonovo (nun Sofia kvartalo), kie li okupiĝis pri frukt- kaj florkulturado. Sian vilaon en Simeonovo li nomis „Esperanto“.

La E-agado de Vl. Lazarov laŝis neforviŝeblajn spurojn en la distrikto de Vidin.

Georgi Simeonov
(kursano de Vl. Lazarov de 1914 j.)

La 20-an de junio, ĉ. j. en Asenovgrad forpasis en sia 48-jara aĝo

Atanas Borisov Manĉev

Esperantisto de 1940 j., li intime ligis sian vivon kun la E-movado. Longjare li estis kasisisto de E-Societo „David Sasonov“ kaj membro de la kontrolo komisiono de DK de Bulgara E-Asocio en Plovdiv.

La 27-an de julio ĉ. j. forpasis en Pazarĝik en sia 73-jara aĝo

Ljuba Vojvodova

Pro ŝia morto nia E-movado kaj la movado de sobreco perdis ardan entuziasman adepton.

En sia 88-jara aĝo forpasis en Orjaĥovo la 2-an de aŭgusto la sindona E-veterano

Georgi Stanev (Onklo)

Niajn kondolencojn al la familianoj kaj proksimuloj de la karaj forpasintoj.

Post korekta solvo de la vortenigmo riceviĝos:

en vicoj I kaj IV: Frazo pri la glora kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo de la bulgara popolo de 1923 j.;

en vicoj II kaj III: tri el la lastaj versoj de la poemo „Septembro“ kaj la nomo de ĝia aŭtoro;

super la ondformaj linioj II kaj III: la nomoj de la gvidantoj de la Septembra Ribelo; la nomo de la heroo en la poemo „Septembro“;

sub la ondformaj linioj II kaj III: la nomo de la vilaĝo, kie eksplodis la ribelo; nomoj de du aliaj loĝlokoj, kie okazis grandaj bataloj inter la ribelintoj kaj la trupoj de la faŝista regpotenco.